Driemaandelijks tijdschrift — Afgiftekantoor: Antwerpen X
Jarkolekto 23 — Trimonata

1/93

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj ILEI

Redaktisto: KOVÁCS Márta

Vic-redaktisto: Stefan MacGILL

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): E. Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout

IPR

Redaktejo: Kovács M., Ady Endre u.23-25 C
H-1221 Budapest
☎ + 36-1-226-3602 (hejma, kun respond-aparato)

Presado: Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140,
B-2000 Antwerpen, ☎ +32-3-234 34 00

Enhavo

CHARTERS, Duncan, Trejnado por E-instruado: kio plej gravas? 1
OU YANG, Dong Liang, Kreeca edukado 12
KURUCZ, Géza, Gramatikaj-leksikaj ekzamenoj 14
Ekzamenoj UEA/ILEI: protokolo 1992; alvoko por nova sekretario . . . 16
KOUTNY, Ilona, E-fako por eksterlandanoj en Universitato Eötvös . . 18
27a KONFERENCO kaj 2a GIMNAZIO de ILEI: Informilo/aliĝilo . meze
GOLDEN, Bernard, Varioj de prononco de Esperanto 19
Kalendaro, labortablete (densaj informoj pri aranĝoj, eldonaĵoj, atingoj) 28
FETTES, Mark, Monda Kunagado stimulas edukadon 29
MacGILL, Stefan, Raporto pri la estrarkunsido de ILEI (marto 1993) . . 30
Alvokoj por novaj kunlaborantoj, labortablete (bis) 36

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Stefan MacGill, Eso u 7 III, H-1034 Budapest, Hungario. *Kunordigo, planado, eldonado, rilatoj kun UEA kaj la movado. (provizore ekzamena sekretariado)*
Vic-prezidanto: Prof. Ronald J. Glossop, 8894 Berkay Ave., Jennings, MO 63136, Usono. Tel. (314) 869-2303. *Eksteraj rilatoj, statistikado, instruado de infanoj.*
Sekretario: Marija Beloševiĉ, Sveti Duh 130, HR-41000 Zagreb- Crnomerec, Kroatio. Tel. (38 41) 57 60 92. *Landaj sekcioj, membro-varbado, konferenca administrado kaj nefaka programo.*
Kasisto: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby. Tel. (46 415) 501 52. *Financo, konferencaj financoj. Membraro.*
Vic-sekretario: Prof. Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., Huazhong Normnal Univ., CN-430070 Wuhan, Ĉinio. *Azia agado, ekzamenoj en Ĉinio kaj Azio.*
Membro: D-ro So Jinsu, Dept. de Ekonomiko, Univ Kangnam, Kugali Kihung-up. Yonging-gun, Kyonggi-do 499-900, Koreio. Tel. (0331)281-5500. Faks. (0331)281-3604. *Universitata agado. Konferenco 1994.*
Membro: D-ro Till Dahlenburg, Feldstr. 13, D-O-2722 Brüell, Germanio. *Ekzamenoj, faka konferenca programo. Metodikaj seminarioj.*
Estrara komisiito: Zsuzsa Barcsay, Bem Rakpart 25/B, H-1011 Budapest, Hungario. Tel. (36 1) 201-2342. *Gimnazio de ILEI. Servoj al instrustoj, trejnado de instruistoj.*

27a KONFERENCO kaj 2a GIMNAZIO

Ni forte pardonpetas pro la senprecedence malfrua aperigo de nia konferenca informilo kaj aliĝilo, kiuj aperas sur la mezaj paĝoj. Tion kaŭzis perdo de antaŭvidita konferencejo decembre. Tuj kiam ni ricevis sufiĉajn informojn, ni sendis la informilon al ĉiuj sekcioj rekte el Budapeŝto (kompletiga stoko devis atingi sekciojn el Belgio). Kelkaj sekcioj modele kopiis kaj distribuis la mendilon. Ĉiuokaze, ankoraŭ eblas nun senprokraste aliĝi kaj ĝui komfortan kaj stimulan semajnon ĉe la Mediteraneo. Tuj aliĝu!

Trejnado por Esperanto-instruado: kio plej gravas?

Duncan CHARTERS (Usono)

Enkonduko

En sia novjara salutmesaĝo kiel prezidanto de ILEI (IPR 4/92), prave atentigas Stefan MacGill pri la bezono emfazi la trejnadon de instruistoj de Esperanto. Ne ŝajnas al mi troigo aserti ke ŝlosila elemento en la pluvivigo de la Esperanto-parolanta komunumo estas la plifortigo de la instruado de la lingvo kvante kaj kvalite. Tiu demando tamen ne ricevis la konstantan atenton kaj disvolvon kiun ĝi meritas, kaj pro tio estas aparte bonvenaj kaj salutindaj la tiurilataj iniciatoj de ILEI kaj la subteno de UEA.

Al la titola demando mi en ĉi tiu artikolo ne pretendos proponi respondon definitivan. Mi tamen deziras skizi plurajn aspektojn kiuj ŝajnas al mi atentindaj, kun la celo montri la amplekson de la demando kaj per tio instigi al maksimume celtrafa planado por la gvidado de niaj instruistoj. Mian aliron al la temo evidente influos miaj propraj perspektivoj surbaze de personaj spertoj en Usono: unuavice en profesia laboro kun studentoj kaj kolegoj en la kampo de instrutrejnado pri fremdaj lingvoj, kaj due kiel kursdirektoro kaj instruisto de Esperanto en diversaj oficialaj universitataj somerkursoj. En San-Francisko ni antaŭ multaj jaroj sukcese iniciatis apartan pedagogian kurson por studentoj interesitaj kaj kvalifikitaj je la progresinta kaj supera lingvoniveloj, kaj al tio kontribuis dum la jaroj diversaj instruistoj laŭ siaj spertoj kaj metodopreferoj.

Kiuj instruu Esperanton?

Kompreneble ni ĉiuj dezirus ke la instruadon de Esperanto prizorgu nur personoj plene kvalifikitaj pri la ĝenerala kaj lingvoinstrua pedagogio kaj pri Esperanto mem. Supozeble plej senkompromise asertas tiun idealon la deklaro de Bernard Golden en lia artikolo aperinta en IPR 3/90: "La sola maniero definitive elimini la fuŝ-instruantojn estas varbi diplomitajn lingvoinstruistojn, kiuj lernos Eon kaj poste instruos la lingvon laŭ metodologiaj principoj jam evoluigitaj por aliaj fremdaj lingvoj sur ĉiuj niveloj." Kompreneble tiu estas laŭdinda celo, tamen el praktika vidpunkto ĝi ne povas esti ekskluziva. Kaj eĉ se ni havus la eblecon certagrade efektivigi varbadon de lingvoinstruistoj, la plej multaj el tiuj — almenaŭ tiel estus en Usono — ne uzas ĝisdatajn metodojn, ne havas jaman ideologian altiron kaj sindediĉon al la aparta valoro de Esperanto, kaj devus oferi ne mallongan tempon al profunda konatiĝo kun la lingvo kaj ĝia ĉirkaŭanta kulturo. Se mankus tiuj kondiĉoj, oni eventuale povus riski iliaflanke daŭran psikologian reziston al la valoro de Esperanto kompare kun la lingvo aŭ lingvoj al kiuj ili dediĉis proprakore sian profesian pregariĝon. Kian veran instigon ili havus por plenentuziasme instrui Esperanton se ne internan? Krome, oni foje argumentis ke en pluraj aspektoj la instruado de Esperanto tiel malsamas de la instruado de tipa fremda lingvo, ke tio postulas apartajn instrukonsiderojn ne tuj evidentajn sed gravajn por la atingo de sukcesaj rezultoj. Tiu tuta temo bezonas apartan studon laŭ ĝisdataj lingvoakiraj kriterioj: bedaŭrinde tion mi povos nur tuŝeti en tiu ĉi artikolo.

Ĉu la demando do ne devas esti, kiel ni povas plivastigi la instruadon de Esperanto kaj samtempe plialtigi la ĝeneralan instrunivelon de la lingvo, kie ajn okazas tiu instruado?

Ĉiu instruisto aŭ trejnisto de instruistoj dezirus havi homogenan lernantaron jam taŭge preparitan ĝis iu normigita nivelo. Tamen en la usona eduksistemo kaj en kursaroj pri Esperanto mi tion malofte spertis, do pro neceso devis konformigi la materialaron kaj prezentadon al la efektiva situacio.

En miaj klasoj pri metodiko de fremdlingva instruado (aŭ "la instruado de dua lingvo", priskribo preferata de usonaj edukistoj kiam temas pri la studo de lingvo negepatra) troviĝas diversmaniere preparitaj lernantoj. Kelkaj jam sekvis plejmultajn pedagogiajn kursojn en la fakultato pri edukado. Aliaj eĉ ne intencas fariĝi instruistoj: plejofte ili deziras informiĝi kaj ricevi praktikajn spertojn pri lingvoinstruado ĉar ilin interesas lingvolernado, kaj la eventualo ke iam, ie, ili havos la okazon instrui aŭ la anglan lingvon aŭ alian lingvon kiun ili scipovas. La klasoj inkluzivas usonajn kaj eksterlandajn studentojn.

Simile en la usonaj pedagogiaj kursoj por esperantistoj kutime kunstudas senspertuloj kaj personoj jam instruintaj la lingvon dum pluraj aŭ multaj jaroj. Krome, inter la lernantoj ofte rimarkiĝas diversnivela lingvoscio.

Ĉu eblas utile instrui ion al tiel miksita lernantaro, kaj se jes, kion ni celu instrui? Nu, unue laŭ mia sperto eblas kaj valoras. Estas tute klare ke oni ne povas samrapide, samprofunde, kaj samefike instrui al tia heterogena grupo kiel al kohera kolekto de jam praktikantaj instruistoj lingve kaj pedagogie kompetentaj. Tamen se tian grupon oni ne sukcesas kunvenigi, kaj se krome oni ne disponas idealan tempon kaj kondiĉojn, ĉu pro tio oni rezignu? Mi dirus ke ne, pro interalie la sube tuj klarigotaj faktoroj.

Ekzistas konsiderinda diferenco inter teoria kompetenteco kaj efikeco en la instruado. Ideale, ĉiu instruonto nepre havu maksimuman prepariĝon lingve kaj pedagogie kaj sciu tion apliki en la klasĉambro. En la praktiko, mi konas multajn lernantojn kiuj dekomence evidentigis naturan, intuician instrutalenton kaj jam de la unua klaso montriĝis pli efikaj ol aliaj jam spertohavaj. Kaj rilate lingvokompetentecon, ni ne forgesu la fenomenon de relative sukcesaj kursoj en elementaj lernejoj kie instruistoj komencis la instruadon sciantaj apenaŭ pli ol iliaj lernantoj. De multaj faktoroj dependas sukcesa instruado. Kian nivelon de entuziasmo kaj kiajn personajn kvalitojn posedas la instruanto? Ĉu la deziron kaj kapablon intuicie kompreni la bezonojn kaj interesojn de la lernantoj por povi respondi al ili? Ĉu evidentiĝas vera amo al la laboro, la materialo, la lernantoj? Ĉu la instruanto prezentas allogan aŭ eĉ inspiran modelon kiel uzanto de Esperanto? Ĉu la klas-situacio faciligas kaj subtenas lernadon kaj alproprigon de la lingvo? Ĉu la klasanoj lernas kunlabori por atingi sian komunan celon? Ĉu la eksterklaseja preparado estas bone elpensita, kaj ĉu la lernantoj ricevas specifan instruon pri kiel plene ĝui kaj profiti tiun tempon por ke la posta klashoro estu maksimume efika? Ĉu la instruanto kapablas motivadi la lernantojn por ke kresku ilia interesiĝo kaj deziro lerni? Ĉu ili vere havas la okazon sperti praktikan internacian uzon de la lingvo per ia interŝanĝo de parola aŭ skriba komunikado kun eksterlandaj parolantoj? Tiaj kernaj demandoj certe ne rilatas nur al metodologio, kvankam sen ia dubo la temojn povas kaj devas pritrakti kaj prilumi tiurilataj diskutoj.

Kiel rezultos pli profesia instruado?

Ni provizu unuavice al profesiaj instruistoj la eblecon kompetentiĝi lingve kaj metodologie pri la instruado de Esperanto. Tion oni evidente ne atingas nur per semajnfinaj kursoj, kaj eĉ ne nur en pli longa unufoja programo. Ni rekonu la neceson de konstanta profesia progreso en la disvolvado de la instrutalentoj. Al tio kontribuas interalie celtrafaj artikoloj en IPR kaj aliaj naciaj organoj kiel la *Bulteno* de la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto (AAIE), kiu provizas utilajn represaĵojn kaj resumojn ne nur el esperantistaj fontoj sed ankaŭ el naciaj revuoj pri la instruado de fremdaj lingvoj. Intensaj kursoj kaj refreŝigaj seminarioj organizitaj diverslande, diversokaze, kaj diversloke, en kaj ekster la kadro de aliaj kunvenoj aŭ kongresoj, ĉiuj havas sian lokon. Kaj la internacia konferenco de ILEI provizas treege utilan semajnon por ĉiujare sub nova lumo esplori kiel ni pliefikigu la instruadon.

Ne kiel proponon por nia agado, pro ne tute kompareblaj cirkonstancoj, sed por doni ideon pri kiel oni povas kreeme elpensi aliajn eblecojn por la plivastigo de la instrutrejnado, mi menciu nun unu sukcesan usonan aranĝon. Ĉiujare okazas plurtaga konferenco de la fremdlingva instruistaro de la t.n. Centraj Ŝtatoj, kiuj ampleksas proksimume duonon de la lando. Dum la unua tago povas aliĝi al speciala trejnoprogramo trideko da instruistoj al kiuj eble tri prezentantoj matene kaj posttagmeze informas, ekzercas kaj problemsolvas pri iu difinita instrutendenco. Tio celas prepari la partoprenantojn por plenumi la skribe promesitan taskon, hejmeniri kaj fari similan prezentaĵon al lokaj kaj regionaj grupoj. Dum tuta posttagmezo mi ĉefprezentis unu tian programon pri ekzamenado, specife pri kiel plikonformigi la ekzamenerojn al tio kion oni efektive celas instrui. Mi reliefigis la fakton ke instruistoj celantaj antaŭ ĉio komunikadon ofte prezentas al siaj lernantoj taskojn kiuj ekzamenas preskaŭ nur gramatikon aŭ elementojn de la lingvo parkere lernitajn, kaj kial tio efike subfosas la laŭdindajn intencojn de la instruisto. Per abundaj ekzemploj el ekzamenoj en la angla, la hispana, kaj Esperanto mi demonstris kiel distingi inter la du specoj de taskoj: tiuj kiuj mezuras nur konatiĝon kun la instrumaterialo, ekzemple kun gramatikaj konceptoj kaj ekvivalentoj de nacilingvaj vortoj, kaj aliaj kiuj klare indikas ĉu aŭ ne la lernanto kapablas apliki tion rekonante la ĝustan uzon de la lingvo kaj mem esprimante sin senprobleme en nova situacio, kiel neeviteble devas okazi en la vera interkomunikado. Pro tio ke la instruistoj ne nur aŭskultis sed kunlaboris en grupetoj ĝis ĉiuj komprenis la esencan diferencon, kaj poste devis mem krei divers-specajn ekzamenerojn laŭ la klarigitaj kriterioj, ĉiuj ricevis kun la multpaĝa disdonita materialaro ĉion necesan por transporti laŭelekte al siaj kolegoj la prezentoformon kaj enhavon de la seminario, tiel ke centoj da aliaj instruistoj tra preskaŭ tuta Usono povis tion profiti.

Tiuj instruistoj do fariĝis kvazaŭ subtrejnistoj, pretaj por helpi pri specifa temo al spertaj kaj nespertaj kolegoj kaj pli memfide progresi en la propra instruado kaj en sia ĝenerala kapablo altigi la instrunivelon en sia medio.

Kiel mi aludis antaŭe surbaze de propraj spertoj, laŭ mia sincera opinio multaj neinstruistoj posedas la necesajn kvalitojn por fariĝi akcepteblaj instruantoj de Esperanto. Pro tio, ĉiu esperantisto potenciale povas esti kandidato

por instrui la lingvon, kaj tion ni ne devus malkuraĝigi! Tamen necesas ke tiaj individuoj manifestu lernpretecon kiel ankaŭ humilecon rilate pedagogion kaj lingvoscion, kaj objektivan rekonon de iliaj provizoraj kapablolimoj. Kaj plue, mi absolute ne deziras kuraĝigi amatorecon, ĉar la lingvoinstrua profesio certe troviĝas inter la plej postulemaj. Sed kondiĉe ke niaj instruvolontuloj komprenu la respondecon kiun alprenas ĉiu kiu trovas sin en pozicio plifaciligi la lernadon de alia individuo, kiel cetere multaj nuntempe konceptas la rolon de instruanto, povas fariĝi konsiderinda avantaĝo por la Movado kaj specife por niaj instruaj celoj inkluzivi ilin kaj ne malhelpi ilian kunlaboron.

Kion provizi por tiaj okazaj instruantoj kiuj ne povos dediĉi tempon al oficialaj universitatnivelaj kursoj pri pedagogio, aŭ al plursemajna aŭ plurjara programo por plene kompetentiĝi pri la instruado de Esperanto? Nu, en niaj kongresoj kaj aliaj kunvenoj ni povus enprogramigi prezentaĵojn kiuj celus tian publikon sed samtempe utilus al jam preparitaj instruistoj. Planantoj tutcerte konsideru inkluzivi specifajn prezentojn pri lingvaj malfacilaĵoj, kaj tiuj prefere ne malatentu erarkorektan ekzercadon de la ĉeestantoj. Se iel eble, la prezentantoj provizu poste restudeblan instrumaterialon. Multe utilus specifaj atentigoj pri la plej oftaj mispaŝoj de novaj instruistoj, kun diskutado pri kial kaj kiel eviti ilin. Tiaj estus ekzemple tro rapida prezento de la lingvomaterialo, tro da detala teoria klarigado kaj maltro da praktiko, malofta uzo de la lingvo mem, multe da parolado fare de la instruanto kompare kun la lernantoj, kaj manko de re-prezentado de la materialo por pli internigita lernado. Individuo sen fakaj studoj eble ne konscius ke en plejmultaj situacioj ekzistas abismo inter klasĉambra "lernado" kaj vera alproprigo de la lingvo por senĝena komunika uzado (kio cetere parte klarigas la fenomenon de la "eternaj komencantoj"). Ankaŭ gravas konscii la fakton ke ne ĉiuj personoj lernas egale: iuj lernantoj kutimiĝis dependi multe pli de la skriba formo de la lingvo ol aliaj, kaj rezistas lernadon kiu baziĝas ĉefe sur imagbildoj aŭ senpera aŭskultado. Unu ĉefa problemo por nesperta instruanto estas tro limigita perspektivo: ĉiu emas instrui laŭ la modeloj observitaj dum la propra lernado, aŭ laŭ pure personaj spertoj kaj antaŭjuĝoj, kaj malfacile konceptas novan vojon. Kaj eĉ se oni ekvidas alian eblecon, se oni ne sentas sin komforta pri ĝi, oni emas post senkuraĝaj provetoj repreni la malnovajn kutimojn. Eĉ lernantoj en kursoj pri pedagogio ofte rezistas novajn metodojn kiujn ili mem ne spertis, kaj foje retiriĝas al pli konataj sistemoj, eĉ kiam tutklare montriĝas ties gravaj mankoj por lernantoj malpli diligentaj aŭ talentaj ol ili.

Kiam mi unue alvenis al mia nuna posteno, la antaŭan jaron furoris en la rusa sekcio la aŭdvida kurso de Crédif. Pro tio oni decidis alpreni tiun saman sistemon por la hispana. Tamen rezultis granda fiasko ĉar niaj studentoj ne estis same motivitaj kiel tiuj de la rusa kaj forte rezistis la metodon, kreante al si propran skribformon de la lingvo kaj plendrifuzante la memorŝarĝon necesan por rilatigi bildojn kaj nur aŭdatan dialogmaterialon. Sama kolegio, sama klas-strukturo. Malsamaj kondiĉoj. La postan jaron la ŝajna sukceso de la rusa programo montriĝis fiimera, ĉar la nova lernantaro havis nek similan talenton nek la pozitivan sintenon de la pasintjara. Eks-studentino pri la rusa, antaŭe rekomendinte tiun sistemon al la hispana sekcio, okaze de vizito al mia klaso pri metodiko reprenis sian rekomendon rezulte de postaj instruspertoj.

Kiajn eblecojn ni pripensu por instrutrejnado?

Do ni ne neglektu la instruantojn. Kaj ni povas eviti ian ŝajnan elitismon provizante programojn kiuj enhavas utilajn konsilojn kaj novajn ideojn por ĉiuj partoprenantoj. En ĉi tiu sekcio mi donu kelkajn ekzemplojn de tio kion oni sukcese realigis antaŭ ol pritrakti la enhavon de instrupretigaj kursoj. En unu horo dum regiona, nacia, aŭ internacia aranĝo ses spertaj instruistoj povas fari ses diversajn individuajn prezentaĵojn pri unu instrutekniko kiu montriĝis aparte sukcesa por ili. Se ili disdonas la koncernan materialon, ĉiuj ĉeestantoj ricevas ses tuj utiligeblajn ideojn por plivigligi siajn klasojn. La preparŝarĝo por la instruistoj ne estas tre granda, ili povas elekti la plej sukcesan el siaj lecionspertoj, kaj el la vidpunkto de la ĉeestanta publiko, tiuj ricevas varian kaj plejofte malenuigan programon kiu devigas al la prezentantoj esprimi sin maksimume klare kaj koncize. Ne surprize ke tiaj programeroj fariĝis sufiĉe popularaj kaj intereskaptaj inter la lingvoinstruistoj, kompare kun konkurencaj unuhoraj prelegoj, kaj ili ofte troplenigas la plej grandan salonon disponeblan.

Evidente ne ĉiuj kiuj bezonas trejnadon, aŭ kiuj povus kunlabori en la antaŭenigo de la trejnado mem, povas esti liberaj tempe kaj finance por profiti eĉ unu plursemajnan aranĝon. Se ni devas utiligi semajnfinajn aŭ kelktagajn kursetojn, ni tiakaze limigu la celojn kaj provizu specifan fokuson kiu certigas, ke ion konkretan reportu la partoprenantoj por pliefikigi siajn klasojn. Unu bona tiuspeca iniciato estas la pasintnovembra kvartaga kurso 'Instrui komunike' gvidita en Poprad de Stefan MacGill, en kiu li prezentis la situacikomunikan metodon kaj ekzercis la partoprenantojn surbaze de sia lernolibro *Tendaraj Tagoj*. Tiaj praktikaj intensivaj kursoj estas k.e.p. ofte ripetindaj kaj subtenindaj. Mi persone sekvis tri tiajn, helpinstruante en unu el ili, pri la parolkompetentigo de lernantoj de la hispana lingvo. Rimarkinda estis en mi mem kaj en la partoprenantoj la nemezureble granda influo de ĉiu seminario en niaj instrukonceptoj kaj klasĉambra praktikado, kiel ankaŭ en nia sinteno kiel instruistoj kunlaborantaj por pliproksimigi nin al difinita celo. Post unu seminario, dum la sekvanta jaro ni ĉiuj interŝanĝis materialojn, spertojn, konkludojn, tiel ke pluvivis la laboro kaj la helpo kiun ĉiuj ricevis unu de la aliaj. Mia grupo inkluzivis seson da verkintoj de jam publikigitaj lernomaterialoj, kaj en la postaj jaroj aperadis la rezultoj en pluraj tutnacie uzataj lernolibroj, kio helpis transformi la instruadon de la hispana lingvo en Usono. Depende de la partoprenantoj kaj de la organizado, tiaj seminarioj povas post nur kelktaga kunlaborado multe pli vaste influi la kvaliton de la instruado ol supozigas la mallonga tempodaŭro kaj la nombre limigita kunestantaro.

Alia ebleco por seminario de jam spertaj instruistoj estas organizi ĝin laŭ la principoj de la usona sistemo de "nefermitaj spacoj". La partoprenantoj estu maksimume pretaj dividi materialojn, scion, kaj sperton kun la aliaj, sed oni ne havu antaŭe elpensitan tagordon. Komence de la seminario oni arigu kaj organizu ĉiujn demandojn kaj temojn kiuj plej gravas al la individuaj ĉeestantoj por ke ilin sisteme pritraktu laborgrupetoj resumontaj por la aliaj siajn dezirojn, demandojn, help-petojn, diskutojn, proponojn, konkludojn, solvojn de problemoj, kaj ĉiujn aparte helpajn kontribuaĵojn. Same kiel en la instruado, ni evitu ŝabloniĝon de niaj proceduroj en kunvenoj kaj seminarioj.

Kiel ni orientu klasojn kaj seminariojn pri metodiko?

Ni supozu adekvatan tempon por prezenti profesinivelan trejnoperiodon por instruistoj, ĉu en la kadro de universitata studprogramo aŭ kiel sendependa du- aŭ tri-semajna intensiva kurso. Kio prezentiĝu al la studentoj kaj kiajn prezentmanierojn utiligu la trejnisto? La respondo devas esti individua, ĉar la kursgvidanto povas kaj devas elekti el inter multaj eblaj vojoj, inkluzivante tiujn aspektojn kiuj ŝajnas plej esencaj por la partoprenantoj kaj preterlasante aliajn por kiuj simple mankos tempo. Se kunstudas novicoj kaj jam spertaj instruistoj, oni zorge atentu ke la plimulto de la kursenhavo estu senprobleme alirebla por la novuloj kaj samtempe stimula por la aliaj. Miasperte tio estas atingebla per saĝa elekto de la studmaterialo kaj bonvenigo en la klasdiskutoj de la problemoj kaj reagoj kiujn nepre deziros komuniki la nenovicoj.

Observinte dum la jaroj multnombrajn brilajn instrutrejnistojn, mi unue deziras atentigi pri unu serioza problemo potenciale negativa por nia laboro. Ĉar en la Esperanta instrumondo la tiurilata konflikto lastatempe reaperis, ni ekzamenu kiel fronti ĝin en niaj kursoj sen etoso de konkurencado kaj nenecesaj malagrablaj tensioj. Temas pri la tendenco de sukcesa instruisto konvinkiĝi pri la valoro de unusola metodo kaj senlace pledi por ĝi, insiste argumentante kontraŭ ĉio alia. Mi devas konfesi, ke pri tiu emo ankaŭ mi ne estis senkulpa. Certe tio estas tute komprenebla, ĉar se oni investis multe da tempo, por ne paroli pri profesia prestiĝo, por antaŭenigi difinitan metodon kiun oni mem sukcesigis en la praktiko, estas nature ke oni deziras tion komuniki al aliaj (ĉu aŭ ne oni serĉas disĉiplojn...), kaj eble oni ankaŭ malemas preni la tempon por riski ion tute novan! Pri tiu punkto mi lernis humilecon de unu el miaj mentoroj, profesoro nacie rekonata en la sepdekaj jaroj pro sia sukcesa sindediĉo al la t.n. individuigita instruado, en kiu sistemo la lernantoj tralaboras propraritme sinsekvajn pakojn da materialoj ĝis superrego pri la enhavo. Li en sia vojaĝado kaj interparolado kun centoj da instruistoj konatiĝis kun instruistino kiu plore informis lin ke ŝi intencas eksiĝi el la instruprofesio. Demandite pri la kialo, ŝi klarigis ke ĝis antaŭ du jaroj ŝi treege sukcesis instrui laŭ la tiutempe laŭmoda parol-aŭskulta metodo. La lernantoj entuziasmiĝis, kaj ŝin laŭdis gepatroj, kolegoj, kaj administrantoj pro ŝiaj elstaraj atingoj. Post seminario pri la individuigita lernado, ŝi konvinkiĝis ke por vere kontentigi la bezonojn de la lernantoj ŝi nepre devas forĵeti sian malnovan instruproceduron kaj alpreni la novan. Sed por ŝi tiu ŝanĝo estis katastrofa. Ŝi streĉe laboregis preparante materialojn kaj korektante ekzercojn kiuj nur tedis la lernantojn, kaj tute perdiĝis la entuziasmo antaŭe spertita de ŝi kaj de ŝiaj lernantoj. Pro tio ŝi konkludis, ke ŝi malsukcesis kiel instruistino kaj devis fari konsciencan decidon forlasi la profesion. Feliĉe, la profesoro klare kaj insiste konsilis al ŝi instrui denove laŭ la metodo kiu antaŭe tiom sukcesis. Li krome certigis al ŝi, ke la grava faktoro nepre ne estas la teorie pli bona valoro laŭ ies opinio de tiu aŭ alia metodo, sed kio plej bone funkcias por specifa instruisto en specifa situacio. Ŝi sekvis la konsilon, kaj denove tiel sukcesis en la elektita profesio ke ŝi ne nur ne perdiĝis al ĝi sed povis daŭre inspiri siajn lernantojn kaj kolegojn per la efikeco de sia laboro. Katastrofo evitita kaj leciono lernita.

"Trovi la plej konvenan metodon por la instruisto kaj situacio." S-ino Sofino Mensen (Nederlando) instruis eksterlandajn junulojn en la kulmina semajno de 5-landa eksperimento de ILEI en Namuro, Belgio en 1977. Eĉ post tiom da regula instruado, s-ino Mensen aliĝis al la kurso de d-ro Charters en KCE (9-17 julio), kie eblos konatiĝi kun novaj metodoj, teknikoj kaj ideoj.



Kian lecionon tio havas por ni se ni kunigu ĝis maksimumo niajn fortojn?

En miaj klasoj pri lingvoinstrumetodoj mi komence de la kurso donas al la studentoj la finan taskon: prepari detalan kaj ampleksan skribitan respondon al la demando kiel ili proponus instrui sian elektitan lingvon al difinita lernantaro. Ili devas pravigi la uzon de la memelektita metodo, pritrakti antaŭvideblajn problemojn pro tiu elekto kaj iliajn solvojn, kaj inteligente montri ke ili plene komprenis ĉiujn faktorojn kiuj influas tiun decidon kaj kial por ili persone tiu ŝajnas esti la plej bona vojo por atingi la deziratajn rezultojn.

Ofte surprizas min kiom diferencas la perspektivoj montritaj en tiuj studoj. Tute ne malofte studento konvinkiĝas pri la valoro de metodo kiun mi mem persone ne elektus, sed la studo evidentigas ke ĉiuj plejgravaj faktoroj estas digestitaj, kaj plejofte post ebla rerigardo de la enklase faritaj videobendoj kaj certe pripensado pri mia observado de la specimenaj klasoj instruitaj mi konkludas ke la lernanto kredeble faris ne tro malsaĝajn decidojn tiurilate.

Mi per tio tute ne deziras pledi por ia arbitra eklektikismo en la elekto de instrutekniko, ĉar aserti ke "mi elektas el ĉiuj metodoj tion, kio plej konvenas por mi kaj miaj lernantoj" povas kaŝi mankon de deziro serioze konsideri la demandojn, aŭ eble sindefendemon, maldiligentecon, eĉ simplan diletantecon. Kontraŭe, la lernantoj prefere konatiĝu kun la psikologiaj, pedagogiaj, kaj lingvistikaj teorioj sur kiuj baziĝas la plej akceptitaj instrumetodoj, ĉar nur tion farinte ili povos inteligente taksi ilian valoron kaj tiun de novaj elpaŝoj kiuj certe prezentiĝos por konsidero en la estonteco.

Ankoraŭ pri multaj esencaj aspektoj de lingvolernado ne finiĝis akra debatado. Mi donu nur kelkajn ekzemplojn. Ĉu "lingvolernado" kaj "lingvoakirado" aŭ natura alproprigo kaj uzado de lingvo estas tiel ekskluzivaj kiel asertas usona psikologo Stephen Krashen? Ĉu duan (aŭ trian) lingvon oni ensorbu "kiel la patrinan lakton" por uzi la metaforon de Andreo Cseh, aŭ ĉu la lernoprocezo estas tute malsama, kiel asertas kontraŭantoj de "rektaj" kaj "naturaj" metodoj kiuj konstatas, kiel atentigadis al ni i.a. Irena Szanser, ke sendepende de la metodo uzata, konstante ĉeestas en la menso de la lernantoj la strukturoj de la gepatra lingvo. Ĉu aŭ ne devus havi eksplicitan rolon la gepatra lingvo en la klasejo aŭ en studmaterialoj? Ĉu gravas atenti interferadon de la gepatra lingvo, de aliaj lernitaj lingvoj, de jam studitaj sed ne plene posedataj strukturoj de Esperanto mem? Danĝera marĉo por nepreparita naviganto! Kaj ni ne forgesu la alian esencan demandon: ĉu Esperanton ni instruu samkiel etnan, fremdan lingvon, kaj se ne, en kio konsistas la apartiĝo de la vojoj?

Resume mi lernis ke preskaŭ senescepte ĉiu metodo iel respondas al necesa elemento en la lernado aŭ alproprigo de lingvo, aŭ al psikologia deziro de ĝiaj lernantoj aŭ de la instruisto. Ankoraŭ multe uziĝas la "tradiciaj" gramatiko-tradukaj lernolibroj kaj instrumetodoj kiuj estis mia ĉefa lingvodieto en la brita lerneja sistemo. Tiuj respondas al la "komforto" de lernantoj kiuj deziras klare kompreni ĉiun lernopaŝon kaj studi lingvon same kiel ili lernis regi ĉiun alian studobjekton. Kaj aŭtodidaktoj, kiuj konsistigas kiel ni bone scias ne malgrandan parton de niaj lernantoj, malfacile povis krei al si realecan komunikosituacion, kvankam iom ŝanĝis tion nia epoko de rapide evoluanta komunikado pere de teknologiaj helpiloj kiel komputiloj kaj telesendiloj.

Post studado laŭ tiuj tradiciaj modeloj, okazis mia unua "kulturŝoko" pri instrumetodiko kiam mi partoprenis en unu el la lastaj seminarioj pri lia rekta metodo prezentitaj de nia esperantista instrumajstro Andreo Cseh. Tuj mi ekkonsciis la grandegajn avantaĝojn por aŭskultokompreno de parola prezento de la lingvo, la memfidon kiu venis de konstanta grupripetado de la lingvomaterialo, kaj praktikan uzadon de la lingvo kontraste kun teoriaj klarigoj nacilingvaj kaj tradukado de unu lingvo al la alia. Jam mi fariĝis disĉiplo! Mi tamen havis okazon nek prediki nek praktiki tiun evangelion, ĉar alveninte al Usono mi trovis min meze de la parol-aŭskulta revolucio, kaj devis strebi internigi al ĉiu unuopa lernanto perfektan prononcadon, kaj rapidekzerci ilin pri longaj dialogoj ĝis tiuj restis por ĉiam gravuritaj en la memoro.

Pro tio ke malgraŭ ĉiuj klopodoj, registare apogitaj retrejnseminarioj por instruistoj, kaj ofte brile viglaj klasoj, lamis la komunika kapablo eĉ de la plej talentaj lernantoj, dum la sepdekaj jaroj la neeviteblan grumbladon sekvis protestkrioj kaj komencis tranformiĝi denove la lingvoinstrua scenejo.

Rezulte, en la okdekaj jaroj disvolviĝis tri sistemoj paralelaj sed kelkrilate konkurencaj por ataki la problemon de la lamanta parolkomunikado. Sandra Savignon kaj aliaj substrekis la neceson de komunikado antaŭ ĉio (kaj certe antaŭ la tradicia studo de gramatiko) sekvante la devizon "korektado bremsas komunikadon." Alia vera movado al kiu mi frue aliĝis bazis sin sur la intervjuo por ekzameni parolkompetentecon kiun jam de jardekoj uzas la usona registaro por taksi la pretecon de kandidatoj por eksterlandaj postenoj.

Oni konstatis ke la lingvoniveloj de ekzamenatoj estas klare mezureblaj, kaj ke krome je ĉiu komunika ŝtupo rimarkinde similas ilia kapablo uzi difinitajn strukturojn de la lingvo, kaj ne utiligi aliajn. El tio oni komencis analizi kiam oni nature kaj plej efike enkonduku specifajn strukturojn, kaj trovis ke la ekzercado en realecaj situacioj multe kontribuas al suprenpuŝado de la komunika lingvokapablo de la lernantoj. Instruistoj kaj lernejsistemoj komencis ĉiam pli bazi siajn kurscelojn kaj ekzamenadon ne sur gramatikaj ŝtupoj lernitaj sed sur komunikoniveloj atingitaj. Tria movado, la aludita "natura" skolo de Stephen Krashen kaj Tracy Terrell, reliefigis la neceson de aŭskultoperiodo antaŭ la parolado, kaj konstruis sur la premiso ke aŭskultado de la lingvo devas esti fundamento por ĝia vera akirado. Kio en unu aspekto revenigas nin al karakteriza trajto de la rekta metodo, kiel okazis en Usono pri la instruado de la angla kiel dua lingvo. En tiu situacio oni trovis ke pro la kutima ĉeesto de diversnaciecaj lernantoj en unu klasĉambro (unu el dekdu enloĝantoj de Usono estas enmigrinto) ne estis praktike uzebla ilia gepatra lingvo. Ankaŭ tio reciproke influis en la instrumetodoj por fremdaj lingvoj.

Post persona konatiĝo kun tiel diversaj metodoj, mi ĉiam pli konscias pri iliaj avantaĝoj kaj mankoj por difinitaj situacioj kaj lernantoj. La metodo kiun mi elektas varias laŭ la sperto de la lernantoj kaj konsisto de la grupo, sed mi nun provizas k.e.p. multajn lerneblecojn kaj alirojn al la materialo por ke ĉiu individua lernanto kapablu ĝis certa grado elekti sian preferatan vojon. Se ni elektas rektan metodon, ni devas pripensi tiujn lernantojn por kiuj ĝi emas resti fundamente frustracia. Ni aŭ modifu la metodon, aŭ provizu helpmaterialojn aŭ -spertojn kiuj ebligos al ili plene partopreni en la klaso. Tiajn demandojn devas nature pritrakti bona kurso pri metodiko.

Mi bone memoras ke kiam mi ekinstruis la hispanan en Kalifornio, la lernolibro uzata en la hispana sekcio estis tre tradicia. Mi do kreis aldonajn materialojn por plifortigi la komunikan kapablon de la klasanoj. Tio sukcesis pli ol mi estus supozinta, parte pro tio ke la klarigoj en la lernolibro estis tre memkompreneblaj kaj komfortigaj al la lernantoj. Eĉ pli bone, mia aldona dialoga klasmaterialo direktiĝis al la konversacia flanko kiun deziris sperti tiuj studentoj sed kiu tute mankis en la libro mem. Ni feliĉe disponas hodiaŭ por la pli junaj lernantoj du kajerojn de *Tendaraj Tagoj*. Tamen se tiuj materialoj ne haveblas aŭ ne taŭgas en nia situacio, nepre ni devas scii adapti aliajn pli tradiciajn se ni havas malsaman instrucelon ol la verkinto de la lernolibro.

Por tion lerni, plej utilas gruplaboro sub la gvido de la trejnisto, kaj poste se oni kopias kaj distribuas la prilaboritajn materialojn, ĉiuj reportos hejmen klarajn ideojn kaj konkretajn ekzemplojn pri kiel fari tian adaptadon.

Pri kiuj specifaj lingvoelementoj kaj helpiloj oni studu?

Kiajn demandojn ni havas pri prononcado? La instruisto nepre donu k.e.p. bonan modelon kaj sciu kiel priskribi la artikulacion de specifaj sonoj por tiuj lernantoj kiuj ne facile kaptas ilin. Kiom emfazi la prononcadon komence? Pri tio ekzistas kontraŭaj opinioj, kaj pro tio la instruisto devas scii la kialon de tiuj kaj decidi kion fari, restante ĉiam preta por eventualaj modifoj laŭ sia observado. Post korekto de komunik-malhelpaj misprononcoj, ĉefe gravas, kiam temas pri demandoj rilate prononcadon kaj intonacion, atentigi la lern-

antojn pri la plej rimarkeblaj nacilingvaj influoj, por ke ili tiajn laŭeble aŭdu, mildigu kaj fine tute evitu.

Por mi aparte gravas la pedagogie aplikata lingvistiko, sed tiurilata diskuto necesigus alian tutan artikolon. Sufiĉu diri ĉi tie ke restas multaj kampoj plugotaj en nia tereno, ĉar kiel atentigis lastatempaj artikoloj en IPR, niaj kutimaj klarigoj de gramatikaj demandoj kiel ekzemple la uzo de la akuzativo, -ig- kaj -iĝ-, kaj la volitivo, ankoraŭ ne donas al la lernantoj klare komprenebla jn, netrosimpligitajn regulojn kiuj respondas al la intuicia uzado de la plej fluparolantaj posedantoj de nia lingvo. Pri la akuzativo, kiom el ni pensis pri la pedagogiaj implicoj de la fakto ke la neuzo de la -n finaĵo estas multe pli facile klarigebla ol ĝia uzo? En multaj lernolibroj (bone ekzemplo estas la ĵus represita *Step by Step in Esperanto*) aperas tiel malfrue ekzemploj de la akuzativo ke studantoj de la libro povus pensi (kaj efektive pensis) ke tio estas ĝena, superflua balasto en la lingvo. En la vera komunikado, kiun formon oni unue uzas? Kompreneble: "Saluto*n*!" Ĉu ni ne povas pli efike fronti la "problemon" de la akuzativo psikologie kaj pedagogie? Pri -ig- kaj -iĝ-, gravas uzi terminojn kiel "unu-ligaj kaj du-ligaj verboj" kiel en *Tendaraj Tagoj*, ĉar la nocioj de transitiveco kaj netransitiveco estas tro abstraktaj por plej multaj lernantoj, eĉ plenaĝuloj. Ĉu oni povas pli sisteme klarigi la tutan uzadon de tiuj sufiksoj? Laŭ mi jes, kvankam mi trovas tion farebla nur se ni akceptas la premison de la gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj. Ekzemple, "konstrui-konstruiĝi" ne funkcias same kiel "beli-beliĝi": se oni apartigas verbojn en unu kategorion kaj substantivojn kaj adjektivojn en alian, la uzado de tiuj sufiksoj, kiel ankaŭ de aliaj strukturaj trajtoj de la lingvo,



"...kial oni legu literaturon, kaj kiajn praktikajn avantaĝojn tio donas ne nur por la alproprigo de Esperanto kaj ĝia kulturo, sed ankaŭ por la homa spirito kaj vivspertoj." Grupo de lernantoj el Zagrebo en 1992 ekkonis la riĉecon de nia literaturo per vizito al la unika biblioteko de s-ro Károly Fajszi en Budapeŝto. Cetere, ilia instruisto partoprenis kiel lernanto antaŭ 16 jaroj la ILEI-semajnon en Namuro!

fariĝas pli klarigebla. Kaj menciindas la volitivo: oni kutime instruas nur la imperativan formon de rektaj ordonoj kaj ne rimarkigas, ke la uzo de la -u finaĵo respondas al klara influrilato aŭ reago (kaŭzo kaj efiko) inter la du agantoj: "mi insistas ke li venas" - raporto; "mi insistas ke li venu" - influo. Do mi ripetu ke gramatiko estu por la instruisto la reguloj kiujn intuicie uzas bonaj parolantoj kaj ne la trosimpligita, falsigita priskribo preferata de kelkaj lernolibroj kaj propagandistoj. La lernantoj komprenu ke gramatikaj malfacilaĵoj kutime fontas ne el Esperanto sed el la gepatra lingvo, kaj kvankam komence la instruisto eble bezonas iom pli da tempo por tion konsciigi al la lernantoj kaj instrui la strukturon de Esperanto konsekvence laŭ daŭre aplikeblaj kriterioj, la fina rezulto estos pli rapida kaj pli natura internigado de la intuicioj de la plenkapablaj posedantoj de la lingvo.

La diversajn lingvokapablojn ni atentu instrui laŭ inteligentaj kriterioj. La aŭskultokomprenadon, aparte se ĝi estas aŭ povas esti vera fundamento de lingvoakirado, oni lernu instrui. Certe mia relative senĝena uzado de Esperanto ŝuldiĝas unuavice al la fakto ke post lernejaj tagoj mi povis aŭskulti preskaŭ ĉiutage dum duonhoro la elsendojn de Pola Radio. Tiajn spertojn oni povas pli sisteme rekrei en la klasĉambro kaj por eksterklaseja ekzerciĝado. Ni lernu instrui la parolan komunikadon, konsciante la barilojn psikologiajn kaj lingvajn kiuj bremsus la progreson de niaj lernantoj al tiu dezirata celo. Ni konsciu ke "legado" por neinstruitoj estas en la komenco malmulte pli ol deĉifrado kaj tradukado, kio ne helpas kuraĝigi al la lernantoj fariĝi pasiaj legantoj de nia literaturo. Kaj se ni instruas literaturon, ni ne forgesu ankaŭ instrui al la lernantoj — kaj fakte tio povas veni de la lernantoj mem en grupa diskutado — kial oni legu literaturon, kaj kiajn praktikajn avantaĝojn tio donas ne nur por la alproprigo de Esperanto kaj ĝia kulturo sed ankaŭ por la homa spirito kaj vivspertoj. Kaj pri kulturo, ni ne forgesu ke pere de Esperanto oni povas aliri tiun kulturon kiu unuigas kaj ne dividas (kiom ofte fiaskas la fremdlingvaj klasoj pri tiu punkto!), kaj ke nia lingvo ja havas propran kulturon kies instruadon ni ne neglektu. Kaj en landoj kie la "multkulturismo" ("Usono estas salatujo, ne fandujo!") fariĝis "politike korekta", ni konsciigu la seriozan edukan funkcion de Esperanto, kiu pli ol iu alia lingvo-studado reliefigas la avantaĝojn de homkultura unueco bazita sur rekono de la valora kontribuo de ĉiu individua etna kaj nacia kulturo. Kaj la skribado celu al verkado, ne nur al skriba reaperigo de ŝablonaj parolekzercoj.

Konklude, ni estu en la avangardo de la lingvoinstruado kaj demonstru ke Esperanto povas fundamente kontribui al tiu profesio kiel preparsperto por lingvostudado kaj kiel pilfortigilo de la instruado de aliaj studobjektoj. Kaj ni ne postlasiĝu de la teknologio, ĉu videa, ĉu komputila, ĉu alispeca. En Usono, kreiĝis nova entrepreno (SLIC) kiu ĉi-jare lanĉas al la merkato unikan sistemon "SpeakToTheWorld" por subteni lingvolernadon pere de komputilo. Profitinte multjaran sindediĉon al la projekto fare de esperantisto-programisto Denis Ferland, jam produktiĝis eksperimentaj materialoj por sistemo kiu utiligas tekston, grafikaĵojn kaj altkvalitan sonon. Tiu laboro jam estas nacie rekonita, kaj Esperanto dekomence estas esenca parto de la projekto. Do ankaŭ tiukampe ni povos progresigi nian aferon, kaj en la venontaj jaroj ni ne subtaksu nian kapablon multon atingi per kaj por la instruado de Esperanto.

Kreeca edukado

Ou-yangDong-Liang

I. Graveco

Kreeca edukado, kiu estas nova temo de edukada reformo en Ĉinio, havas tre gravan pozitivan kaj historian signifon al la evoluo de produktado kaj al la progreso de la scienco kaj tekniko.

De elementa lernejo ĝis universitato, la studenta tempo en lernejoj estas maksimume deksep aŭ dekok jaroj, kiuj signifas nur dudek procentojn de la tuta homa vivo. Tamen, tiuj jaroj estas startpunkto de laborado kaj fonto de potenco en la estonta vivo. Tio ĉi ne signifas, ke la instruisto transdonas ĉiujn sciojn al la studentoj, kiujn ili bezonos en sia laboro. Dum tiu mallonga periodo la ĉefpunkto estas tio, ke la instruisto devas direkti la studentojn kiel kree ricevi kaj apliki sciojn. Estas plej grave kiomgrade kreece instruas la instruistoj kaj kiomgrade kreece studas la studentoj.

Estas mitologia historio en Ĉinio: la mitviro Lü Dong-bin povis *"tuŝi ŝtonon kaj ŝanĝi ĝin en oron"*. Junulo vidis kaj enviis tion. Lü Dong-bin demandis lin: *"Ĉu vi volas oron? – do, prenu ĝin"*. Sed la junulo deziris liajn *fingrojn* anstataŭ la oron. Kial? Ĉar li komprenis, se li dezirus oron, unu estus unu, dek estus dek, liaj posedaĵoj finfine estus limigitaj; tamen se li ricevas la fingrojn kaj tuŝas ŝtonon kaj ŝanĝas ĝin en oron, li povos esti riĉulo, kies riĉaĵoj estas senlimaj.

Lü Dong-bin estas kiel instruisto, la junulo kiel studento. *Oro* estas pronomo de pretaj scioj. *Fingro* estas *krei instruon* kaj *kapablo* de kreeca apliko al scioj kaj teknikoj.

Instruisto devas emfazi kapablojn de studentoj studi kaj kreajn sciojn kaj teknikojn de la instruado. Kapablaj geedukistoj, nuntempe kaj pasinttempe, en Ĉinio kaj eksterlande, ĉiam emfazas ĝuste disponi la ligon inter instruo de scioj kaj evoluo de kapabloj de studentoj. Al kiuj estas instruitaj nur pretaj scioj kaj kies intelekton oni ne ekspluatis atente, ordinare estas robotumaj kaj kreiv-mankaj en la labora praktikado.

Sed kiel ni povas evoluigi kapablojn?

Ni devas elformi studentan kapablon je direkta enprofundigo kaj plenekstera etendigo, samtempe ke ni fortigas bazajn teoriojn kaj fundamentajn teknikojn.

II. Direkta profundigo

Evoluo de studenta kapablo ĝenerale estas unuanima kun la enhavo de studado. Ordo de scia akcepto reflektas leĝon de kapabla evoluo. Nutri kapablon estas kompakte rilata kun bazaj scioj. Kvankam diferenca, nutri kapablon estas necese kaj interkompletigite al progresado de scia posedo ĝi estas evoluigita kun tio. Deflankigite de scioj, kapablo estas arbo, kiu ne havas radikojn. Kiel la proverbo diras: *scio estas forto* – forto makroskope esprimas kapablon.

Efika metodo kiu direkte profundigas studentan kapablon estas, ke studentoj skribas observajn tagnotojn; en la instruado oni adoptas sugestan instrumetodon, instruante novajn sciojn oni paŝu de malprofunda al profunda; enkonduku "esploran metodon" en la ripetado de malnovaj lecionoj.

Antaŭ la klaso la instruisto asignas studentojn, kiuj konkludas kaj ordigas koncernajn sciojn. La instruisto elektas tipajn ordigajn formojn, skribas la ĉefan enhavon. Tio ĉi estas projekciata kaj montrata al studentoj kaj klari-ganta de ordiganto. Poste, ĉiuj diskutas kaj koncize resumas ĉion. Tiamaniere la instruisto nutras memstudajn kaj eldirajn kapablojn.

Laŭ la komuna kaj ĉefa problemo en konkludo kaj ordigo, la instruisto establas kondiĉojn esplori problemon, vekas studentan intereson kontinuigi aktivan pripenson, fari rilatan diagramon kaj uzi projekciilon ktp. Do, la instruisto plenumas ne nur la taskon instrui nuntempajn sciojn, sed plue nutras ankaŭ la studentajn kapablojn de analizado kaj sintezado.

III. Plenekstera etendigo

Direkta enprofundigo estas *liniece* nutri sciojn kaj kapablojn. Plenekstera etendigo estas *stereece* evoluigi sciojn kaj kapablojn. Ĉi tiuj estas sistem-konstruadoj, instruadaj metodoj nutri novan generacion, kiuj havas kreajn potencojn, apartenas al *kreeca edukado*.

Post kiam ni konigas strukturon, naturon kaj farmanieron de mara-alga acida natrio, tra diskuto pri ekspluatado kaj aplikado de mara-alga acida natrio en manĝaĵ-industrio, pres-tinkturada industrio kaj farbo-industrio, studentaj scioj kaj kapabloj ricevas levigon je sterea evoluo.

Instruisto lerta en sia profesio igas la studentojn ricevi la metodojn. Instruisto devas instrui studajn metodojn al studentoj, igas ilin posedi studajn leĝojn. Ding zhaozhong, fama fizikisto diris: "Ne instruu senvivajn sciojn. Instruu studentojn per metodoj, malfermu ilian pensadon kaj transdonu al ili memstudajn kapablojn." Claude Bernard opinias, ke bona metodo povas igi nin pli bone disvolvi kapablon por apliki naturdonon, sed malbona metodo eble baras la disvolviĝon de kapabloj. Evidente, instrua metodo ludas ege gravan rolon.

Instruisto devas instrui al la studentoj lertecon en observado. La studentoj ne devas nur mekanike parkerigi surfacajn fenomenojn, sed ili devas atente observi karakterizojn de aĵoj kaj kapti naturon de la aĵoj. La instruisto kondukas studentojn konsideri, analizi kaj kompari, li malfermas la studentajn pensadojn. Kiam studentoj anticipe preparas kaj ripetas lecionojn, la instruisto deziras igi ilin sintezi kaj resumi post iom da memlerno kaj igi ilin dedukti lernaĵojn post la fermo de libroj. Profunda kompreno iam bele estigas originalajn opiniojn. Komencante la lecionon, la instruisto devas deziri, ke studentoj rimarku lian pensadon. Fermante librojn, la studentoj konkludas kaj resumas kaj deduktas laŭ sian pensado. Tiel studentoj posedas ne nur sciojn, sed ankaŭ

studajn metodojn kaj leĝojn. Ankaŭ iliaj kapabloj estas nutritaj. Ili ricevas la *fingron* de Lü Dong-bin "tuŝi ŝtonon kaj ŝanĝi ĝin en oron".

"Malelstara instruisto transdonas veraĵojn. Elstara instruisto instruas studentojn por malkovri veraĵojn." Ĉu la instruada arto de iu instruisto estas bona aŭ malpli bona, decidas ĉu li povas nutri studentan kapablon malkovri veraĵojn aŭ ne. Ju pli granda tiu kapablo estas, des pli bona estas la instruada efekto kaj des pli alta estas la instruada kvalito.

Ou-yang Dong-Liang, La Dua Mezlernejo
Shaoyang-gubernio, Hunan-provinco
CN-422115 P.R. Ĉinio


INSTRUA PRAKTIKO:

GRAMATIKAJ-LEKSIKAJ EKZERCOJ

El la aperigota ekzercaro de KURUCZ Géza

I. Kompletigu la frazojn baze de la parentezaj esprimoj!

1. Petro **demandis** min ... (tiu afero).
2. Petro **demandis** ... (mi) tiun aferon.
3. Ili **petis** min ... (viziti) iliajn parencojn en la ĉefurbo.
4. Ili **petis**, ke mia frato ... (viziti) iliajn amikojn.
5. Sinjoro Bo **instruis** ... (ni) biologion.
6. Sinjoro Bo **instruis** ... (ni) pri biologio.
7. Mi **timas** ... (neniu).
8. Mi **konscias** ... (graveco) de la demando.
9. Li estas **kontenta** ... (nenio).
10. Ĉu vi jam **renkontis** ... (tiu problemo)?



II. Kiu(j) el la frazoj estas ĝusta(j)?

A) Ambaŭ frazoj estas ĝustaj.
B) Neniu frazo estas ĝusta.
C) Nur la unua frazo estas ĝusta.
D) Nur la dua frazo estas ĝusta.

1. 1. Edina manĝis du da ĉokolado.
   2. En Januaro ni laboris nur tri semajnoj.
2. 1. Tamara kaj sia amiko vizitis teatron.
   2. La patro iris hejmen kun siaj kolegoj.
3. 1. Ĉi tie estas tre varma, ĉu ne?
   2. Li estas kuraĝa, timas de nenio.



4. 1. Ĉiuj libroj kuŝis antaŭ li sur la tablo.
   2. Stefano haltis sian aŭtomobilon.
5. 1. La patro estas du jarojn pli aĝa ol la patrino.
   2. Aleksandro estas tiel inteligenta kiel Paŭlo.
6. 1. La amikino skribas tre bele.
   2. Dimanĉo mi ne lernas en la gimnazio.
7. 1. Tio estas la kajeroj de mia klasamiko, Aleksandro.
   2. Jen turistoj el Aŭstrio.
8. 1. Petro kaj Maria estas tre inteligenta.
   2. Kiom da ĉokolado vi manĝis hieraŭ?





III. Kiu vorto estas mislokita?

1. A) mamuta C) giganta
   B) eleganta D) elstara
2. A) senhava C) honesta
   B) malriĉa D) povra
3. A) malofte C) denove
   B) ree D) refoje
4. A) abelo C) muso
   B) muŝo D) kulo
5. A) senhalte C) seninterrompe
   B) konstante D) kelkfoje
6. A) kolumo C) manumo
   B nazumo D) krurumo
7. A) kolekti C) sin nutri
   B) manĝi D) konsumi
8. A) aviadilo C) boato
   B) ŝipo D) flosilo



Respondoj:

I. 1. pri tiu afero; 2. min; 3. viziti; 4. vizitu; 5. al ni; 6. nin; 7. neniun; 8. pri graveco; 9. pri nenio; 10. tiun problemon

II. 1.B; 2.D; 3.B; 4.C; 5.A; 6.C; 7 D, 8 D.

III. 1.B; 2.C; 3.A; 4.C; 5.D; 6.B; 7.A; 8.A.



PROTOKOLO: EKZAMENOJ DE UEA/ILEI por 1992.

San Francisko, Usono, julio

CARLSON, Arthur, Cupertino, Usono.
ROSILLO VEGA, Joaquin, San Pedro de los Pinos, Meksiko, ambaŭ elemente
GALVIN, Charles, San Francisko, Usono.
LEONI de LEON, Antonio, San Jose, Kostariko.
RAOLA GONZALEZ, Orlando, Havano, Kubo, ĉiuj meze

Vieno , Aŭstrio, julio

Elementa nivelo

ABRAHAMSEN, Jardar E, Eggesbones, N
FILALI-WILLI, Renata, Kriens, Svislando
HERRERA, Ricardo, San Jose, Kostariko
KNUDSEN, Helge, Oslo, Norvegio
MAKKONEN, Pentti, Jyvaskyla, Finnlando
MICHALKE, Steffen, Auerbach, Germanio
RAMAZANI, Yambuka, Kinshasa, Zairio
RANNIKKO, Reima, Suomussalmi, Finnl.
YAO, Afantchao-Biakou, Notse, Togolando
SOUREN, Anneliese, Vaals, Nederlando
SCHERFF, Klaus, Germanio

Meza nivelo

BERTHELOT, Fabienne, Roterdamo, NL/F
BURUTXAGA, Pedro, M, Blanes, Hispanio
EMANUELSSON, Agneta, Katrineholm, S
FARRENKOPF, Ulrich, Miltenberg, Germ.
LAAKSONEN, Terhi, Tampere, Finnlando
LAUWEN, Elise, Vught, Nederlando
MELBERG, Loftur, Hafnarfjordur, Islando
MYNTTINEN, Synnove, Lahti, Finnlando
O RIAIN, Sean, Dublin, Irlando
PIGNATELLI, Francesco, Mareno, Italio
RADA, Jiri, Ĉeĥoslovakio
SHAHRAM, Saber, Kopenhago, IR/DK

Bratislavo, Slovakio, aŭgusto

GELETA, Erno, Nove Zamky, CS, meze

Qingdao, Ĉinio, aŭgusto.

Elementa nivelo:

ZHU Wenzu, Qingdao.
CHEN Bin, Qingdao.
SUN Yu, Qingdao.
YANG Ruihua, Qingdao.
ZHANG Long, Qingdao.
LIU Shanping, Qingdao.
HU Qing, Qingdao.
LI Ming, Qingdao.
JIANG Min, Qingdao.
LIU Hong, Qingdao.
FU Guiqin, Changsha.
WANG Dong, Qingdao.
FU Ruibiao, Hainan.
WU Wenbao, Qingdao.
WANG Yuying, Qingdao.
RAN Chunlin, Chongqing.
LI Jiagui, Jiangyou.
SHEN Siwei, Huaian.
DU Zebin, Qingdao.
BA Jingke, Changji.
GAO Ying, Qingdao.
WANG Baiping, Hefei.

Meza nivelo:

SHI Xueqin, Zhenjiang.
LU Xishan, Qingdao.
LEE Kim Kiew, Singapuro.
ZHANG Ping, Qingdao.
JIANG Tao, Qingdao.
JI Yingeng, Shandong.
ZHENG Wenlong, Qingdao.
ZHANG Ping, Qingdao.
CHEN Nei, Qingdao.
HOU Haiyan, Qingdao.
XU Aizhen, Qingdao.
BU Zhanbao, Handan.
ZHANG Ziming, Qingdao.
WU Jianxia, Jiangxi.

Vraca, Bulgario, oktobro

HASAN Jakub Hasan, Konop, meze.
STANKA Slavova, Stanĉeva, meze.

Zagrebo, Kroatio, decembro

SVETLICIC, Gordana, elemente

La Chaux-de-Fonds, Svis., aŭg.

Estis kvar kandidatoj sed protokolo neniam atingis ILEI.

Sume sep sesioj en sep landoj, kun sesdek ok (plus kvar?) sukcesintoj, venintaj el 22 landoj kaj 4 kontinentoj. Apartan gratulon meritas la plej granda sesio en Qingdao okaze de la 5a Pacifika Kongreso.

Protokolon kompilis: S. MacGill, aganta ekzamena sekretario.
Budapeŝto, aprilo 1993.

Pli da ekzamenotoj ol ekzamenontoj!

1992 liveris kontentigan nombron da sesioj kaj sukcesintoj. Tamen, ILEI daŭre ne havas sufiĉajn fortojn por administri la ekzamenojn kaj verkadi testojn. Komence de 1993 la ekzamena sekretario, transpreninta en 1992 la oficon, devis pro familiaj kialoj retiriĝi. Ni dankas al s-ino Hunninck pro la farita laboro, kaj ekserĉas novan oficanton. Sube ni listigas la ĉefajn taskojn, kiuj rilatas nur al la elementa kaj meza niveloj – ni serĉas apartan sekretarion por povi lanĉi la superan nivelon. Vidu punktojn 2 kaj 4 de la raporto pri la estrar-kunsido (ekde paĝo 30 de la nuna numero).

TASK-PRISKRIBO DE LA SEKRETARIO DE LA ELEMENTAJ KAJ MEZAJ EKZAMENOJ DE UEA/ILEI

1. Teni kontakton kun rajtigitaj ekzamenantoj (IRE) kaj la 6-membra ekzamena komisiono (IEK), informante pri petataj sesioj, la verkado de testoj kaj ĉiuj evoluoj de la ekzamenoj.
2. Akcepti proponojn (kun biografioj) por rajtigo de novaj IRE-anoj kaj voĉdonigi ilin ĉe IEK. Ĉiun trian jaron rekonfirmi la konsiston de IRE.
3. Teni stokojn de ekzamentestoj, atestiloj, konsilaroj k.s. Kunordigi kun la prezidanto de IEK la verkadon de novaj testoj.
4. Instigi centrojn, asociojn kaj aliaj gastigi ekzamen-sesiojn. Ekzistas dokumento listiganta la kondiĉojn kaj donante konsilojn.
5. Akcepti de centroj, asocioj kaj aliaj petojn por ekzamen-sesioj, informi ILEI pri tiuj, trovi la necesajn tri ekzamenantojn (inkl. unu prezidanton), liveri ĝustatempe ekzamen-testojn, atestilojn, protokol-folion, konsilarojn.
6. Ricevi, kontroli kaj konservi la protokolojn tuj post la okazigo de sesioj. Informu la prezidanton de IEK pri la rezulto.
7. Laŭeble kunordigi la ekzamen-sesion en la Universala Kongreso, aŭ trovi anstataŭanton por tio.
8. Liveri necesajn materialojn al regionaj (kontinentaj) kunordigantoj, por ke ili povu memstare agadi, sed ricevi de ili regule raportojn kaj kopiojn de ĉiuj ekzamen-testoj, kiujn ili verkas.
9. Kompili jaran protokolon por aperigo en IPR kaj sendo al UEA pri ĉiu sesio okazinta en ĵus pasinta kalendara jaro.

La pluiro de niaj ekzamenoj dependas je la senprokrasta trovo de sekretario, kiu povos transpreni iujn aŭ ĉiujn el la supraj taskoj laŭgrade kaj kun enkonduka helpo. Normalaj kostoj (afranko, kopiado ks.) estos kompensitaj, ĝis limo konsentota kun la kasisto de ILEI. Bonuso iuspeca estas ricevebla kaze de organize kaj finance sukcesa ekzamena jaro. Interesiĝantoj anoncu vin al la aganta sekretario, Stefan MacGill, Esö u. 7 III, HU-1034 Budapeŝto, Hungario.

Esperanto-fako por eksterlandanoj
en la Budapeŝta Universitato Eötvös

1. Internacia koresponda Esperanto-fako komenciĝos denove en la studjaro 1993/94 ekde septembro (poste ĉiun trian jaron)

La 2+1-jara formado (entute 6 semestroj) intencas doni ĝeneral- kaj aplikat-lingvistikajn bazojn por la studado de internacia lingva komunikado, ĝi okupiĝas detale pri la problemoj de interlingvistiko kaj pri diversaj terenoj de esperantologio (priskriba gramatiko, literaturo, movadhistorio).

La bazaj studobjektoj koncentriĝas en la unuaj du jaroj, ĉe kies fino la gestudentoj submetiĝas je ŝtata ekzameno kaj defendas sian diplomlaboraĵon, tiel ili akiras la magistran titolon. La tria jaro ebligos enprofundiĝon en la elektitan fakon (esperanta gramatiko, esperanta li-teraturo, interlingvistiko, lingvopedagogio [por instruistoj], ĵurnalistiko kaj redaktado de eldonoj aŭ komputila lingvistiko). Tio pretigas kandidatojn por doktoriĝo. Ili devos prezenti disertaĵon ene de tri jaroj kaj ekzameniĝi antaŭ doktoriga komisiono.

Postuloj: supergrada diplomo (min. **bachelor**), bona scio de kaj pri Esperanto, okazos akcepta ekzameno.

Formo: orientiga vizito en septembro 1993, poste po unusemajna rstado en Budapeŝto dum semestrofinoj por prelegoj, konsultiĝoj kaj ekzamenoj. Tiam la gestudentoj ricevas ankaŭ informojn kaj materialojn por la sekva semestro. Dum la semestro ili devas memstare labori surbaze de la disdonita temaro kaj plenumi skribajn taskojn. **Kotizo:** (laŭ semestroj): 500 dolaroj.

2. Taga Esperanto-fako ĉiujare

La 2-jara (kun bazgrada scio de Esperanto), aŭ 2,5-jara (sen scio de Esperanto) formado enkondukas gestudentojn en diversajn terenojn de interlingvistiko kaj esperantologio (priskriba gramatiko, literaturo, movadhistorio, metodiko).

Postuloj: supergrada diplomo (min. **bachelor**)

Formo: partopreno en la lecionoj de la ordinara taga Esperanto-fako, plue kompletigaj stduhoroj (ĝenerala lingvistiko, enkonduko en la hungarajn kulturon kaj lingvon). Por tiuj kiuj ne scias Esperanton, okazas intensa lingvoinstruado dum la unua semestro.

Rezulto de la studoj: fine de la dua jaro finpretigo de diplomlaboraĵo, ŝtata (kompleksa) ekzameno, akiro de magistra titolo. Kotizo: (laŭ semestroj): 1750 dolaroj.

3. Kompleta universitata formado en taga kurso ĉiujare

5-jara supergrada formado (kombinite kun iu alia fako, partopreno en tagaj kursoj kaj lernado de la hungara lingvo)

Postuloj: abiturienta ekzameno

Rezulto de la studoj: fine de la 5-a jaro finpretigo de diplomlaboraĵo, ŝtata (kompleksa) ekzameno, akiro de diplomo (magistra grado).


Kotizo (laŭ semestroj kaj fakoj): 1750 dolaroj

Aliĝo: Esperanto-fako, Eötvös Universitato,
Budapest, Pf. 107. H-1364 Hungario

27a ILEI-KONFERENCO
kaj 2a GIMNAZIO de ILEI
La Paterna, Valencio
31a julio — 6 aŭgusto 1993

Tiuj du eventoj okazos en Hispanio, tuj post la Universala Kongreso en Valencio. Do, la datoj estas de la posttagmezo de la 31a de julio (sabate) ĝis tagmeze de la 6a de aŭgusto (vendrede) 1993.

La situo kaj kondiĉoj estas tre favoraj. Gastigos nin la vilaĝo La Paterna, tuj ekster Valencio (enlande) kaj ligita al ĝia urbocentro per rekta metro-linio. La konferencejo estos tri-stela hotelo nomata 'La Paterna', kiu proponas komfortajn (laŭ niaj normoj — luksajn) klimatizitajn ĉambrojn (unu-, du- kaj pli-litajn), kun bano, televido kaj telefono. Ĝi troviĝas rande de la vilaĝo apud oranĝarbaro. La hotelo havas 180 litojn en 70 ĉambroj — ni provizore rezervis 120, sed ni devos anonci definitivan mendon kaj part-pagi anticipe, do senprokrasta mendado estas grava. Tial ni sendas ĉi tiun aliĝilon kaj informilon



rekte al niaj sekcioj pli frue ol la apero de IPR 93/1, kie ĝi krome aperos.

La hotelo povos disponigi almenaŭ unu klimatizitan kunven-salonon, pliaj salonoj troviĝas en najbara lernejo 'La Salle', kiu entenas elstaran natursciencan muzeon. La inaŭguron ni verŝajne okazigos en la urbodomo de La Paterna, kies instancoj estas helpemaj. Du restoracioj kaj bufedo estas ligitaj al la hotelo. Ĉi tiu hotelo kompreneble kostas pli ol la pli frue celata junular-gas-

tejo, sed, pro personaj kontaktoj, ni ricevis tre favoran prezon, kiu permesas al ni praktike konservi la rekorde nealtan guldenan kotizon de la antaŭa jaro. Jen kion ni anoncas por restado en 2-lita ĉambro:

TARIFO A: 340 NLG 1200 SEK 21.000 ESP
TARIFO B: 240 NLG 800 SEK 8000 HUF 3500 slovakaj kronoj.

A: Loĝantoj de okcidenta Eŭropo, Nord-Ameriko, Japanio kaj Aŭstralazio. **B:** Ceteraj landoj. Post la 31a de majo ĉiuj kotizoj altiĝos je 20%. Studentoj kaj instruistoj de la gimnazio ricevos rabaton de 20%.

- Guldene oni povas pagi al UEA ĉe la konto de ILEI, **ilek-a**, kun klara indiko 'Por la 27a Konferenco'. La ĝirkonto de UEA estas 378964.
- Svedkrone oni povas pagi al la kasisto de ILEI, adreso kape de la aliĝilo; pĝk. 682117-7.
- La favora tarifo en pesetoj estas nur por loĝantoj de Iberio (Hispanio kaj Portugalio), bv. kontakti la hispanan ILEI-sekcio por detaloj.
- La tarifoj en forintoj kaj slovakaj kronoj estas nur por loĝantoj de reform-eŭropo, kaj estas pagendaj resp. al la hungara ILEI-sekcio (Kovács Márta, Ady Endre u. 23C, HU-1221 Budapest) kaj E-Centro Poprad. Sobotske nám 6, 058 01 Poprad, Slovakio.

Konferenca temo:

La kleriga valoro de la Esperanto-instruado

Plej ofte ni konferencas pri tio, *kiel* instrui la lingvon Esperanto, do pri metodoj, manieroj, teĥnikoj, procezoj, rimedoj k.s., krome pri lerniloj kaj ankaŭ pri motivado. Ĉio ĉi celas la alproprigadon de la lingvo. Lingvoj ja estas rimedoj de la komunikado: per lingvo ni esprimas parole aŭ skribe niajn pensojn kaj sentojn, transdonas aŭ ricevas informojn.

En la nuna konferenco ni observu, *por kio* ni utiligas Esperanton: *kion ni komunikas* dum la kursoj (ĉeestaj aŭ korespondaj) al niaj lernantoj kaj kursanoj. *Kio estas la enhavo*, kiun ni esprimas kaj disvastigas pere de Esperanto. La Internacia Lingvo devas peri informojn pri la interetna, internacia eĉ homara civilizo, kulturo, scienco, teĥniko, sporto k.s., ĝi devas ebligi komunikadon pri religioj, edukado, politiko, ekonomio, turismo, artoj ktp. ktp.

Sekve dum la lingvolernado oni ankaŭ apliku la lingvon: *ni instruu Esperanton en ĝia funkcio – en komunikado pri realaj, interesaj kaj dignaj temoj.*

Esperanton lernantaj personoj havu ne nur unu lingvan rimedon pli ol aliuloj, sed ili fariĝu ankaŭ pli kleraj, larĝhorizontaj individuoj ol tiuj, kiuj

ALIĜILO: 27a KONFERENCO kaj 2a GIMNAZIO de ILEI

La Paterna (apud Valencio); sabate 31 julio – vendrede 6 aŭgusto 1993

Bonvolu sendi ĉi tiun aliĝilon al s-ro Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio. Bv. plenskribi apartan aliĝilon por ĉiu persono.

Mi aliĝas al la: Konferenco _____; Gimnazio: _____

Familia nomo: .....Antaŭnomo: .....

Profesio: .....Sekso: .....Naskiĝdato: .....

Kompleta poŝta adreso: .....

.....

____ Mi mendas ___-litan ĉambron kaj deziras loĝi kun .....

____ Mi mendas unu-litan ĉambron kaj petas informojn pri krompago

____ Mi deziras manĝi vegetare.

____ Mi havas alian dietan aŭ loĝigan bezonon, nome:.....

____ Mi volonte kontribuos al la programo per: .....

.....

Mi interesiĝus pri C-grada Cseh-smeinario: jes/ne

Mi interesiĝus pri sesio de la UEA/ILEI ekzamenoj: elementa/ meza

Mi pagas la kotizon al ..... en dato .....

je la sumo de ..... en valuto.....

____ Mi partoprenos la Universalan Kongreson en Valencio jes/ne.

____ Bv. sendi al mi informojn pri favorpreza loĝado en ĉi tiu hotelo dum la semajno de la Universala Kongreso. (2500 pesetoj tage kun matenmanĝo).

POR GIMNAZIAJ KANDIDATOJ:

Mi aparte interesiĝas pri:.....

Mi proponas por la gimnazio programeron:.....

Mi volonte adaptiĝos al la normala disciplino de la Gimnazio.

POR ĈIU ALIĜANTO:

Subskribo: .... Dato:.....Loko: .....

ALIĜILO: 27a KONFERENCO kaj 2a GIMNAZIO de ILEI

La Paterna (apud Valencio); sabate 31 julio – vendrede 6 aŭgusto 1993

Bonvolu sendi ĉi tiun aliĝilon al s-ro Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-242 94 Hörby, Svedio. Bv. plenskribi apartan aliĝilon por ĉiu persono.

Mi aliĝas al la: Konferenco _____; Gimnazio: _____

Familia nomo: .....Antaŭnomo: .....

Profesio: .....Sekso: .....Naskiĝdato: .....

Kompleta poŝta adreso: .....

.....

____ Mi mendas ___-litan ĉambron kaj deziras loĝi kun .....

____ Mi mendas unu-litan ĉambron kaj petas informojn pri krompago

____ Mi deziras manĝi vegetare.

____ Mi havas alian dietan aŭ loĝigan bezonon, nome:.....

____ Mi volonte kontribuos al la programo per: .....

.....

Mi interesiĝus pri C-grada Cseh-smeinario: jes/ne

Mi interesiĝus pri sesio de la UEA/ILEI ekzamenoj: elementa/ meza

Mi pagas la kotizon al ..... en dato .....

je la sumo de ..... en valuto.....

____ Mi partoprenos la Universalan Kongreson en Valencio jes/ne.

____ Bv. sendi al mi informojn pri favorpreza loĝado en ĉi tiu hotelo dum la semajno de la Universala Kongreso. (2500 pesetoj tage kun matenmanĝo).

POR GIMNAZIAJ KANDIDATOJ:

Mi aparte interesiĝas pri:.....

Mi proponas por la gimnazio programeron:.....

Mi volonte adaptiĝos al la normala disciplino de la Gimnazio.

POR ĈIU ALIĜANTO:

Subskribo: .... Dato:.....Loko: .....

konas nur nacia(j)n lingvo(j)n. Pro tio ni elektis la supran temon. Kontribuaĵojn ni atendas en formoj de prelego, diskut-gvidemo, leciono aŭ ekspoziciaĵo pri:

- Diversaj sferoj de la kultura fono de Esperanto
  - en la Esperanton parolanta komunumo
  - regiona/nacia kulturo, perata per Esperanto
  - homara kulturo, perata per Esperanto
- Kiel integri materialon pri la kultura fono en la lingvan stud-materialon
- Kiel didaktike kaj metodike prilabori la konojn pri la kultura fono en la diversnivelaj kursoj kaj unuopaj lecionoj
- Prezento de lerniloj, kiuj estas modelaj el ĉi tiu vidpunkto
- Konkretaj propraj spertoj pri instruado de la kultura fono
- Proponoj por kolekti materialon aplikeblan en la instruado diversnivele.

S-ino BARCSAY Zsuzsa, Budapeŝto, 1993-03-03

INSTRUISTA TREJNADO —VOJO PLUEN

ILEI fiksis por ĉi tiu jaro sian prioritaton por la laboro: nome la instruistan trejnadon kaj konforme al tio ĝi anoncis tri kursojn en la jaro. Ni deziras diskutigi ankaŭ ĉi tiun temon en nia konferenco, konstatante, ke ĝi estas traktebla el plej diversaj vidpunktoj, tiel ke ĉiu partoprenanto trovos aspekton laŭ sia gusto aŭ kapablo. Nome, ni tuŝos jenajn aspektojn:

Lingvaj aspektoj:

Kiel la strukturo de la lingvo mem povas aŭ devas influi la metodojn, manierojn instrui ĝin, kaj sekve ankaŭ la manierojn trejni instruistojn? Kiuj punk-

ATESTANTO PRI KANDIDATO POR LA ILEI-GIMNAZIO
flanke de ILEI-sekcio, instruisto aŭ esperantistaj gepatroj:

- La lingvokono de la kandidato sufiĉas, por ke li/ŝi lernu diversajn fakojn en Esperanto dum gimnazia semajno.
- Li/ŝi jam pruvis emon adaptiĝi al komunumo de samaĝuloj kaj al baza disciplino.
- Kaze de akcepto, pri la kandidato respondecos dum la semajno kaj pri revojaĝo la sekva persono, kiu estos samtempe kaj samloke ano de la 27a Konferenco de ILEI:

Nomo: .....
Adreso: .....
Atestanto: .....Dato: .....Subskribo .....

toj de Esperanto bezonas apartan atenton — kia estu tiu atento? Ĉu ni jam havas adekvatan didaktikan gramatikon por Esperanto? Ĉu ni havas adekvatajn instruilojn?

Kulturaj aspektoj:

Kiujn kulturajn konojn ni volas enmeti en la instruadon? Kiujn konojn ni volas peri pri la esperantista komunumo, historio, literaturo? Kiajn mondajn temojn ni volas emfazi? Kian etikan bazon ni evoluigu? Kiel ni trejnu instruistojn adekvate peri tiujn konojn? De kiuj kulturaj fonoj ni ĉerpu niajn estontajn instruistojn; kiel tio influos la kuntekston en kiun ili metos la lingvon? (Notu, ke ĉi tio precize rilatas al nia konferenca temo)

Motivigaj aspektoj:

Kiel ni konvinku lernantojn studi la lingvon? Kiel ni certigu, ke ili apliku ĝin kontentige dum kaj post la lernado? Kiel ni konvinku instruistojn lerni kaj instrui la lingvon? Kiuj unuavice devas prizorgi tiun varbadon?

Organizaj aspektoj:

Kiuj landoj povos sendi instruistojn al jam anoncitaj kursoj? Kiuj landoj povus aliri edukajn instancojn por rekonigi kursojn de ILEI? Kiuj landoj povus gastigi instruistan kurson kaj varbi la necesajn instruistojn? Kiuj landoj povus organizi inform-kampanjon inter instruistoj kaj edukistoj tiucele? Kiel eblus certigi la sukcesan enkondukon kaj pluiron de instruado post tia kurso?

El tiu priskribo vi konstatas, ke ILEI komprenas, ke nur instruista trejnado en izolo ne sufiĉos — ni provis skizi la necesajn paŝojn en la najbaraj kampoj de informado, varbado kaj aplikado. Tamen ni estas konvinkitaj, ke la instruista trejnado estas la ĝusta nodo-punkto ĉe kiu ni koncentru niajn fortojn.

Partoprenos nian konferencon d-ro Duncan Charters, profesia trejnisto de lingvo-instruistoj en Elsah, Ilinojso, kiu estos gvidinta tiam nian ĉefan instruistan kurson en KCE, La Chaux-de-Fonds, kaj kiu havos pro sia multjara profesia aktivado kaj tiu freŝa Eŭropa sperto, valorajn ideojn kaj konsilojn pri la temaro. Li ludos gravan rolon en la tem-trakta teamo.

Partoprenu la diskutojn kaj la laboron en nia 27a instruista konferenco!
Estu parto de la vojo pluen!
Nia instruado havu valoran kaj allogan enhavon kaj ni trejnu niajn instruistojn konforme al tio!

Varioj de la prononco de Esperanto

Bernard GOLDEN

1. Enkonduko

Okaze de la konferenco de la 6-aj Landaj Pedagogiaj Tagoj en Budapeŝto (1991.02.23-24) mi prezentis prelegon pri varioj en la prononco de Esperanto. La nuna artikolo estas pli ampleksa versio de tiu prelego por publikigo en Internacia Pedagogia Revuo.

François Lo Jacomo (1981:39) estas dubema pri la ekzisto de esperanta fonologio, t.e. tute internacia maniero prononci Esperanton, ĉar ĉiu parolanto posedas etnan lingvon, kiun li uzas pli ol Esperanton. Laŭ Lo Jacomo, per kutimiĝinta orelo estas eble aŭdi diferencojn inter diversaj prononcoj de Esperanto.

La celo de mia prelego estis aŭdigi per magnetofono ekzemplojn de la prononco de Esperanto de personoj, kiuj estas parolantoj de 18 diversaj etnolingvoj. Ilia prononcado ĝenerale povas esti kvalifikita bona, ĉar ne ĉiam estas facile identigi influantan etnolingvon. La ilustraĵoj estis ĉerpitaj el selektita fontmaterialo, konsistanta el surdiskigitaj kaj surbendigitaj prononc-tekstoj, poem-deklamoj, prelegoj, radioprogramoj k. s. La tekstoj plejparte estis voĉlegitaj, do malestis spontanaj konversacioj. Inter la parolantoj estas aktoroj, deklamistoj, radioparolantoj, profesiaj lingvoinstruistoj, fonetikisto, homoj, kiuj uzas Esperanton pro ĉiutagaj profesiaj kialoj, funkciuloj de organizaĵoj, verkistoj kaj aliaj membroj de la klera elito en la esperanta lingvokomunumo. Pro tempolimigo mi havis eblon dum la prelego aŭdigi nur la unuajn kvar erojn de la tuthora programo.

La unua parolanto estis Duncan Charters (1964), kiu prezentis monologon titolitan "Mia eksterlanda vojaĝo". Li estas brito, nuntempe loĝanta en Usono kaj oficanta kiel universitata instruisto de la hispana lingvo. En sia prezentaĵo li imitas la malbonan prononcon de sep esperantistoj, kies gepatraj lingvoj estas facile diveneblaj: britangla, kroata, franca, germana, itala, japana kaj usonangla. La efiko de ĉi-speca travestiita aŭ burleska prononco de Esperanto estas amuzi, eĉ ridigi aŭskultantojn, kiu facile perceptas la influon de etnolingva fonetiko kaj intonacio.

Por doni kontraŭpezon al la duba pedagogia valoro de la parodio, mi aŭdigis partojn de tri diskoj speciale preparitaj por ilustri bone prononcatan Esperanton. La lingvo de ĉiuj tri parolantoj estas la britangla (Wiliam Auld, 1972; Victor Sadler, 1964; John. C. Wells, 1969). Ili demonstras, ke denaskaj parolantoj de la angla ja kapablas akiri bonan prononcon sen orelagacaj alofonoj aŭ intonacio, kiuj rivelas ilian etnan devenon.

1.1 Diskut-temoj sur la tereno de esperanta fonologio

La usona lingvisto Richard Wood (1987:64) metas diskutadon pri la prononco de Esperanto inter jenajn kvar polusajn konceptojn:

1. teorio kontraŭ praktiko
2. okcidenteŭropa elitismo kontraŭ universala egalismo
3. perfekteco kontraŭ realeco
4. preskribemo kontraŭ priskribemo

En tiu kadro mi listigis en la prospekto de mia prelego dekon da temoj, rilatantaj al la fonetiko de Esperanto kaj al la normoj de prononcado. Nuntempe, same kiel en la pasinteco, ne estas unuanima akordo, precipe, ĉar mankas objektivaj sciencaj esploroj, kiuj povas provizi donitaĵojn en sufiĉe granda kvanto por esti statistike analizeblaj. En la sekvaj sekcioj mi tuŝos tiujn demandojn sen provi elĉerpi la individuajn temojn, el kiuj ĉiu meritas apartan studaĵon.

2. Preskriba normprononco de Esperanto

La historio de la disvolviĝo de la normfonologio de Esperanto estas dividebla en tri stadiojn (Wood, 1987:76).

2.1. Origina zamenhofa stadio.

La aŭtoro de Esperanto donas kelkajn konsilojn pri la prononcado de Esperanto en siaj "Lingvaj respondoj" (Zamenhof, 1962). Numeroj 67-72 pritraktas la prononcon de la kvin vokaloj, la literojn *j* kaj *ŭ, n* antaŭ *k* kaj *g* kaj la vortakcenton. Estas evidente, ke tiu prezentado estas tre mankhava. Ekzistas du ekzemploj de la parolmaniero de Zamenhof mem, kiujn li registris sur vaksaj fonografaj cilindroj komence de la 20-a jc. Tiuj sontekstoj estis surbendigitaj, kaj mi aŭdigis ilin en la prelego, sed la nuna kvalito de la malnovaj registraĵoj ne ebligas klaran aŭdon de la zamenhofa prononco de ĉiuj sonoj.

2.2. La francisma stadio

En la 1930-aj jaroj anstataŭis la simplajn zamenhofajn regulojn pri la prononcado de la kvin vokaloj multe pli komplika sistemo de vokalaj alofonoj, elpensita de la hungaro Kálmán Kalocsay (1931:116-121) kaj la franco Gaston Waringhien (1980:39-49). Ĉar iliaj gepatraj lingvoj diferencigas inter vastaj kaj malvastaj vokaloj, kaj ili ambaŭ okupiĝis pri la problemoj de prozodio en esperanta versfarado, ili preskribis, ke tiu trajto karakterizu la vokalsistemon de Esperanto.

Dum la sekvaj jardekoj, tiuj kiuj provis uzi aŭ instrui la sistemon de Kalocsay kaj Waringhien, konstatis, ke ĝi estas nek lernebla nek instruebla. Wells (1978:19) rimarkigas, ke esperantistoj, kies gepatra lingvo konas nur tri gradojn de vokala vasteco, prakatike neniam aplikas la regulon pri alofonoj. La sovetia lingvisto Bokarev (1984:6) nomas la problemon pri vasteco kaj longeco de esperantaj vokaloj "tute malprava kaj sensignifa".

2.3. Universalisma aŭ nov-zamenhofa sistemo

Reagante kontraŭ la nenecese komplika prononc-regularo, kiu regis dum la francisma stadio, oni serĉis pli simplan sistemon, kiu evitos la eŭrocentrismon de Kalocsay kaj Waringhien, kaj antaŭvidos la estontecan prononcon de Esperanto fare de popoloj ekster Eŭropo. Pro tio oni reiris al la simpleco de la zamenhofa sistemo en la unua stadio, kaj hodiaŭ eblas paroli pri la nov-zamenhofa stadio.

3. Priskribaj esploroj de la prononco de Esperanto

Lo Jacomo (1981:39) starigas kriterion por objektiva priskribo de la prononco de Esperanto: ĝi ne devas esti bazita sur prononco paŭsita laŭ fonologio difinita apriore fare de aŭtoro de lernolibro kaj instruita en lernolibroj. Lo Jacomo insistas, ke oni ne demandu parolantojn; oni aŭskultu nur kiel ili parolas. Ekzameno de kelkaj publikigitaj rezultoj de esploroj pri la prononco de Esperanto indikas, ke ili estas malkontentigaj laŭ metodologia vidpunkto, precipe, ĉar la korpuso de parolaj tekstoj estas relative malgranda kaj la informantoj ne venas de sufiĉe da malsamaj etnolingvaj grupoj. Ekzemple, mankas parolantoj de ekstereŭropaj gepatraj lingvoj.

W. A. Verloren van Themaat (1975) faris esploron pri la frazakcento en Esperanto, kiu bezonis po dek provpersonojn el tri lingvobranĉoj: la latinida, ĝermana kaj slava. Neniu slavlingvulo kunlaboris, kaj la kvin franclingvuloj pritraktis nur tri kvinonojn de la tekstoj.

Sherwood (1982a) verkis referaĵon pri variado en Esperanto, sed ĝi baziĝas sur publikigitaj donitaĵoj, ne sur registritaj sontekstoj. En dua referaĵo pri statistika analizo de konversacia Esperanto, Sherwood (1982b) utiligas 30-minutan registritan konversacion inter brito kaj flandro.

Lo Jacomo (1981:40) plendas pri nesufiĉo da registritaj tekstoj. Kvankam li opinias dezirinda korpuson kun 50 registraĵoj de la parolata lingvo, por sia propra esploro li devis kontentiĝi per 20 minutoj da registrita konversacio de parolantoj de nur tri etnaj lingvoj.

Geraldo Mattos, brazila lingvisto, kiu nun oficas kiel la direktoro de la Sekcio pri Prononcado de la Akademio de Esperanto, okupiĝas pri la kolekto de sontekstoj por fari priskriban analizon de la prononco de Esperanto. En 1989 li publikigis en unu el la Akademiaj Cirkuleroj alvokon pri kunlaboro: oni sendu al li per sonbendo registraĵon de teksto, kiu konsistas el nur 84 vortoj! (Mattos, 1987 kaj 1989). Cetere, en tiu teksto troviĝas nek ĉiuj fonemoj de Esperanto nek ĉiuj eblaj grupiĝoj de sonoj interne de morfemoj kaj ĉe la limoj de du morfemoj. Sekve, ne estas imageble, kiel tiu magra teksto povos provizi Mattos per sufiĉe da donitaĵoj por fari vere profundan analizon de la prononco de Esperanto.

Estas nekompreneble, kial esplorantoj pri la fonetiko de Esperanto ĝis nun ne pli intense ekspluatis la materialon de la Magnetofona Servo de UEA. Ja

katalogo eldonita antaŭ pluraj jaroj listigas pli ol 300 horojn da sonbendaj programoj, konsistantaj plejparte el registraĵoj de la parolata lingvo de plurcent esperantistoj el diversaj partoj de la mondo.

4. Kiuj trajtoj karakterizas la bonan, ĝustan prononcon de Esperanto?

Kvar kriterioj estas listigitaj de Wells (1978:25-26)

1. Praktike bona prononco ebligas komunikiĝon inter esperantistoj, kies gepatra lingvo estas malsama. Sekve, la minimuma nivelo estas komprenebleco de la lingvo.

2. Lingvistike bona prononco spegulas la fonologian karakteron de Esperanto kaj distingas ĉiujn kontrastajn fonem-parojn.

3. Geografie bona prononco estas neŭtrala en la senco, ke ĝi ne posedas etnolingvajn trajtojn kiel la uzon de alofonoj anstataŭ la ĝustaj esperantaj fonemoj. Alivorte esprimite, geografie bona prononco malebligas al aŭskultanto divenon de la gepatra lingvo aŭ lando de la parolanto. Pro tio oni povas nomi tian prononcon internacia. Ĝi staras sur maksimuma nivelo.

4. Sociologie bona prononco respektas la sintenon de la esperanta lingvokomunumo, en kies subkulturo jam enradikiĝis nocioj pri preferata prononco de fonemoj kun malaprobo de alofonaj variaĵoj.

5. Ĉu eblas elradikigi etnolingvan influon en la prononco de Esperanto?

Lingvistoj kaj lingvoinstruistoj nomas fonetika interfero la emon prononci lernatan lingvon per la sonoj kaj ritmoj de la unua (denaska) lingvo. Sporade en lernolibroj kaj prilingvaj artikoloj troviĝas avertoj pri prononceraroj en Esperanto, kiuj rezultas de influo de la gepatra lingvo de la lernantoj. Pli precize esprimite, ili uzas alofonojn (variaĵojn de esperantaj fonemoj), aŭ ili substituas al tiuj ĉi tute malsamajn fonemojn, kiuj estas la plej proksimaj ekvivalentoj en ilia etna lingvo. Kelkfoje tiu procedo nur parte perturbas interkomunikiĝon, ĉar aŭskultanto povas diveni tion, kion la parolanto volas esprimi. Ĉiuokaze, la konversacio sonas strange, ne-esperante. Male, pli gravaj estas prononcdevioj, kiuj okazigas miskomprenon, do ili estas evitendaj. Ekzemple japanlingvulo prononcas *birdo*, kiam li intencas paroli pri *bildo*, kaj angla parolanto diras *kato* anstataŭ *karto*. Bona pritrakto de tiu ĉi problemo kun rilato al fonetika interfero en la Esperanto parolata de hispan- kaj anglalingvuloj estis verkita de Wells (1987). En malpli detala maniero la japana lingvisto Kawasaki (1959) priskribas malfacilaĵojn en la prononco de Esperanto, kiujn alfrontas parolantoj de la japana lingvo. Bokarev (1984) ilustras similan fenomenon en la Esperanto parolata de ruslingvuloj, kaj Lapenna (1971:149-152) kontribuas ekzemplojn de fonetika interfero ĉe parolantoj de aliaj eŭropaj etnolingvoj. Li tuŝas ankaŭ la demandon pri flankakcento por eviti miskomprenon. Same kiel Albert Lienhardt (1973:101-108), Lapenna priskribas malplifortan flankakcenton en kunmetitaj vortoj. Kontraŭe, Waringhien (Kalocsay, Waringhien, Bernard: 1984:13-14), rifuzante tiun instruon, klarigas, ke la akcento de la unua elemento en kunmetaĵoj "simple malaperas". La demando pri akcentado en Esperanto devas esti profunde esplorita, same kiel la parolmelodio de esperantistoj havantaj diversajn gepatrajn lingvojn. Wood (1984:74) rimarkigas, ke nenio kun scienca valoro estis verkita pri Esperanta intonacio. Ekzemple, oni ne rajtas supozi, ke ekzistas internacie komprenebla demanda intonacio. Ĝuste tial, en demandaj frazoj aŭ *ĉu* aŭ alia demanda vorto nepre estas bezonata.

Kelkfoje konsiloj pri la prononco de Esperanto estas misgvidaj, eĉ eraraj. David K. Jordan (1981:39 kaj 41) misinformas, ke anstataŭigo de la prononco de *ĥ* per tiu de *k* estas "tute akceptebla", sed li ne avertas lernantojn, ke la *ĥ*-fonemo kelkfoje estas nemalhavebla, ĉar ĝi havas kontrastigan funkcion: *ĥoro/koro, ĥolero/kolero*. Jordan same mispaŝas, kiam li konsilas al anglalingvuloj, kiuj trovas malfacile prononcebla la konsonant-grupon *sc*, ke ili ne faru fortostreĉon sed prononcu simplan *s*, kiu estas "sufiĉe bona kompromiso (...) kvankam tiu prononco estas subnorma". La rezulto de tiu misinstruo estas, ke malaperos la kontrasto en jenaj paroj: *sceno/seno, scito/sito, scilo/silo*.

Sherwood (1982a:188-193) okupiĝas pri la sama problemo laŭ la vidpunkto de la estonteca evoluo de Esperanto. Li argumentas, ke Esperanto havas pli da konsonantoj, sekve pli da subtilaj distingoj, ol estas konvenaj en lingvo destinita al uzo fare de parolantoj de multaj malsamaj gepatraj lingvoj. Li prognozas, ke konsonantaj prononcmalfacilaĵoj kaŭzos neŭtraligon de kelkaj distingoj, kiuj, tamen restos en la skriba lingvo: *posta/poŝta*. Aliaj ŝanĝoj okazos por konformigi Esperantajn morfemojn al la fonetika strukturo de etnolingvoj; tiel *gvido* fariĝos *gŭido*. Modifado povos okazi en morfemoj komenciĝantaj per *eks-* kaj la "neŭtrala" *ekz-*, ambaŭ el kiuj kolizias kun la produktivaj prefiksoj *eks-* kaj *ek-*, kvankam tiuj ĉi prefiksoj ofte estas sekvataj per junkturoj, kiuj malestas en la morfemoj.

5.1. Ekzercoj por korektado de prononceraroj

Estas sciate, ke bebo havas la kapablon prononci centojn da fonemoj, nur ludante per la voĉorganoj, sed post pubereco tiu agado fariĝas fiziologie kaj mense limigita. Pro tio plenkreskuloj anstataŭigas kelkajn fonemojn de Esperanto per alofonoj aŭ tute fremdaj fonemoj el la gepatra lingvo. Per ekzercoj estas eble minimumigi la efikon de tiu fonetika interfero. Wells (1987:781-782) proponas la sekvajn kvar paŝojn.

1. Oni devas kompreni, kiu detalo estas erara kaj – laŭeble – kia estas la artikulacia diferenco inter la erara sono kaj la ĝusta.

2. Oni devas laŭbezone lerni percepti per la aŭdo la diferencon inter la du: por tio utilas aŭdekzercoj ("oreldresado"), ekzemple ekzercoj por rekoni, ĉu la instruisto diktas *aĵo* aŭ *aĝo*, *baro* aŭ *varo*, *kodo* aŭ *kordo*.

3. Oni devas lerni fari la necesan muskolgimnastikon.

4. Oni devas transigi la nove akiritan kapablon el la zorge kontrolata unuopa vorto en la klasĉambro al la ordinara konversaciado en Esperanto, en kiu la vortoj ligiĝas flue en frazojn kaj oni ne kontrolas konscie ĉiun sonon.

Wells komentas, ke tro ofte oni ignoras la duan kaj la kvaran paŝojn.

6. Ĉu norma prononco povas ekzisti en diaspora lingvokomunumo?

En sekcio 1 estis menciita la skeptikeco de Lo Jacomo (1981:39-40) pri la ekzisto de internacia, norma fonologio de Esperanto. Kiel determini ĝin, kaj surbaze de kiuj informantoj? Kiom da parolantoj de kiom da diversaj etnoj devas esti ekzamenitaj por identigi la vere internaciajn prononctrajtojn? Ĉu troviĝas parolantoj de etnolingvo, kies prononco de Esperanto estas tre bona, ĝuste ĉar ilia lingvo havas la saman fonologian strukturon kiel tiu de Esperanto? En la pasinteco oni emis kompari Esperanton kun la hispana aŭ itala lingvoj, sed fonetika analizo montras, ke la serbokroata estas pli bona kandidato, ĉar la sola malfacilaĵo estas distingo de *h* disde *ĥ*. Wells (1987:782)

Wood (1987:76) opinias, ke la unueco de la parolata lingvo daŭre disvolviĝas rezulte de interago de esperantistoj, aŭskultado de radioprogramoj, diskoj kaj kasedoj, kaj partopreno en kongresoj. Tamen, relative malgranda proporcio de ĉiuj esperantistoj havas la kutimon utiligi la sonmaterialon pri-skribitan de Wood aŭ ĉeesti sufiĉe ofte kongresojn, kie ili povas aŭdi kaj paroli kun uzantoj de la internacia Esperanto.

Komence de ilia lernado de Esperanto, la komunikaj situacioj de lernantoj limiĝas al la kursoĉambra ĉirkaŭmedio, kie ili aŭdas, krom la prononco de la instruanto aŭ instruisto, ankaŭ la provojn de siaj samkursanoj paroli en Esperanto. Bonŝancaj estas tiuj lernantoj, kies kursgvidanto utiligas diskojn aŭ sonbendojn kun ekzemploj de modela prononcado. Sociaj situacioj por la uzo de Esperanto prezentiĝas, se estas loka Esperanto-klubo. Tie lernantoj havas okazon komunikiĝi kun pli spertaj esperantistoj, sed la tempo havebla por tiuj kontaktoj kutime estas tre mallonga, eble nur unufoje semajne aŭ monate. Frekventado de kunvenoj de la loka Esperanto-grupo povas havi ankaŭ kontraŭdidaktikan efikon, se lernantoj renkontiĝas kun eternaj komencantoj, kies balbuto malkuraĝigos ilin. Ĝuste pro la malalta nivelo de la lingvouzo de kelkaj societoj, bonaj uzantoj de la lingvo ofte seniluziiĝas kaj ĉesas partopreni en la agadoj. Tiel lernantoj estas forlasitaj, kiam ili plej bezonas helpon kaj stimulon de pli kompetentaj parolantoj de la lingvo.

Ankaŭ la tiel nomataj denaskaj esperantistaj infanoj alfrontas la saman problemon. Ili aŭdas la lingvon unue el la buŝoj de la gepatroj; ofte temas pri nur unu el la geedza paro, kiu scias Esperanton. Se la prononco de la gepatroj estas subnorma, ankaŭ tiu de la infano estos malbona. Antaŭ nelonge tiu situacio estis bagateligita de la redaktoroj de bulteno por familioj instruantaj Esperanton en la hejma ĉirkaŭmedio. Ili esprimis sian vidpunkton jene:

"Same ne maltrankviliĝu pri via (ne)scio de perfekta Esperanto. La infano parolas precize la saman specon de Esperanto, kiun vi parolas al ili. Do, se vi havas germanan prononcon, li havos germanan prononcon. Sed, ĉu tio vere gravas?" (Brennan, Corsetti, 1984:4)

Tiu hereza opinio estas nepre kondamnenda de ĉiuj okupiĝantaj pri pedagogiaj aspektoj de Esperanto.

Evidente, la unua paŝo por disvastigo tra la esperantistara diasporo de norma prononcado devas komenciĝi en la kursoĉambro. Ĉiuj instruantoj kaj instruistoj de Esperanto estu devigataj sukcese liberiĝi "el la fonetikaj katenoj de la gepatra lingvo", kiel esprimas sin Wells (1978:26) por proprigi al si la norman prononcon. Por atingi tiun celon, estas necese prepari abundon da diskoj kaj kasedoj, ne nur por kursa uzo sed ankaŭ por faciligi al aŭtodidaktoj kaj izoluloj la aŭdon kaj imitadon de modela prononcado.

Ankoraŭ unu didaktika rimedo estas bezonata. Antaŭ proksimume du jardekoj, Alfred Lienhardt (1973:101) proponis, ke por atingi laŭeble plej belsonan prononcon, en ĉiuj landoj, estas necese havi lernilon pri modela prononco, fidinde verkitan laŭ la postuloj de la fonologio. Devas akompani tiun lernilon surbendigita versio de ĝiaj tekstoj. La 16-paĝa lernilo, kiun Lienhardt verkis, ne povas servi kiel vera manlibro pri la prononcado de Esperanto, ĉar ĝi ne estas verkita de profesia fonetikisto kaj pro tio estas malpreciza. Urĝe bezonata estas Plena Analiza Fonetiko de Esperanto (PAF), sed kiu verkos aŭ redaktos ĝin? La plurjara stagnado de la Sekcio pri Prononcado de la Akademio de Esperanto indikas, ke tiu institucio en sia nuna stato ne estas kompetenta entrepreni aŭ gvidi la publikigon de definitiva verko pri la fonetiko de Esperanto.

7. Kiuj estas la tolerendaj limoj de prononca variado aŭ deviado?

Wells (1978:26) klarigas, ke grava sociologia fakto estas, ke la transformo de Esperanto de surpapera kabineta lingvo al vivanta, plene funkcianta lingvo rezultigis normojn de prononcado. Tamen ili ne estas absolute unuecaj kaj certe ne estas observataj de ĉiuj parolantoj de la lingvo. Pro tio estiĝas apud la teoria pritraktado de la fonetiko de Esperanto bezono decidi, kiel la fonetiko funkciu en praktikaj situacioj. Temas ne nur pri prononcaj devioj kaŭzitaj de fiziologiaj faktoroj, ofte ne tute supereblaj, sed ankaŭ pri varioj en la prononco de vortoj en normala konversacio, kiam la parolantoj ne povas ĉiam regi la ĝustan artikulacion de sonoj en kontakto kun aliaj sonoj.

7.1. Vokaloj

La temo jam estis pritraktita en sekcio 2 sed valoras tie ĉi citi la opinion de Wells kun rilato al alofonoj de *e* kaj *o*. La Kalocsay-Waringhien-regulo pri malvastaj alofonoj de tiuj du vokaloj povas esti tolerata en la prononco de esperantistoj, kies gepatra lingvo konas pli ol tri gradojn de vokala vasteco, sed

ĝi neniel estu konsiderata kiel deviga. Tiu regulo ne havas lokon en neŭtrale internacia prononcmaniero (Wells, 1978:23).

7.2. Asimilado

Ĝi estas fenomeno okazanta en pluraj lingvoj. Kiam ekzistas voĉaj kaj senvoĉaj konsonantoj, asimilado rilatas al la tendenco doni al du sinsekvaj konsonantoj, unu voĉa kaj alia senvoĉa, la saman specon de voĉeco. Asimilado povas okazi interne de morfemo kaj ankaŭ ambaŭflanke de la limo inter morfemoj. Ekzemplo de progresa asimilado estas *diverza* (diversa); regresa asimilado okazas en *egzisti* (ekzisti). Morfemlima kazo estas *vidaz ĝin* (vidas ĝin). Estas diferenco de opinioj pri asimilado en Esperanto. Bokarev (1984:6) malrekomendas ĝin en fonetika lingvo kiel Esperanto, en kiu "ĉiu aparta fonemo en ĝi ne devas koincidi kun iu ajn alia". Kontraŭe Wells (1978:24) reliefigas, ke asimilado povas konduki al miskomprenoj nur malofte (*subtaso/suptaso*) do ĝi "eble estu tolerata - sed ne rekomendinda". Laŭ Waringhien (1980:40) nur regresa asimilado estas tolerebla.

7.3. Sinerezo kaj dierezo

Sinerezo estas la unusilaba prononco de du apartaj vokaloj. En Esperanto ĝi okazas, kiam senakcentaj *i* kaj *u* en silabo antaŭ alia vokalo perdas sian silabecon kaj prononciĝas kiel *j* aŭ *ŭ* respektive. Anstataŭ *mielo* oni diras *mjelo*, kiu estas tute alia vorto, kaj *jaguaro* fariĝas *jagŭaro*. Wells trovas ĝin malrekomendinda, ĉar ĝi atencas la principon de ortografia reguleco. Bokarev avertas kontraŭ la uzo de *j* por apartigi sinsekvajn vokalojn: *ĉijelo* (ĉielo), *mija* (mia).

En la praktiko ne estas tiel facile eviti sinerezon. La esploro de Lo Jacomo (1981:48) evidentigas, ke ofte okazas neŭtraligado de la zamenhofaj fonemoj *i* kaj *j* en neakcenta pozicio. Plue, li konstatis, ke estas malfacile realigi la dierezon (prononcon en apartaj silaboj) en vortoj kiel *iama* kaj *hieraŭ* sed akcenti la *i* pli forte ol la *a* kaj *e* respektive.

7.4.Tolerado

Ĉu, do oni toleru tiujn deviojn por praktikaj konsideroj, same kiel Zamenhof konsilis en "Lingva Respondo" 71, temanta pri palatigo de konsonantoj antaŭ *i* kaj velarigo de *n* antaŭ *k* kaj *g*?

"Batali kontraŭ tia natura emo en la elparolado ŝajnas al mi afero tute sencela kaj senbezona, ĉar tia elparolado (kiu estas iom pli eleganta, ol la elparolado pure teoria) donas nenian malkompreniĝon aŭ praktikan maloportunaĵon; sed rekomendi tian elparoladon (aŭ nomi ĝin "la sole ĝusta") ni ankaŭ ne devas, ĉar laŭ la teoria vidpunkto (kiu en Esperanto ofte povas esti ne severe observata, sed neniam povas esti rigardata kiel "erara") ni devas elparoli ĉiun sonon severe aparte..." (Zamenhof: 1962:59-60).

Bokarev (1984:6) samsintene konkludas, ke oni ne povas insisti, ke iu speciala alofono estu la sola reprezentanto de la koncerna fonemo; sekve, ni rigore

obeu la principon de fonemikeco, kiu gravas por interkompreno, sed ni "estu toleremaj al tio, kio estas sensignifa" laŭ la vidpunkto de interkompreno.

Konsultitaj verkoj

William Auld. William Auld legas poezion. Gramofondisko, monofona, Falkirk, Stirlingshire, Skotlando: Krea-Sono, West Records, 1972. 18cm, 33 t/m, duflanka.

E. A. Bokarev. Fonemo kaj sono en Esperanto. Internacia Pedagogia Revuo. 1984.1:5-6.

Anna Brennan kaj Renato Corsetti. La stadioj de dulingveco. Cirkulaĵo por esperantlingvaj paroj kaj familioj. 1988 junio 3:2-4.

Duncan Charters. Mia eksterlanda vojaĝo (monologo, 6:30) en: Ni kantu en Esperanto. Gramofondisko, monofona, Esp-Disk, Novjorko, 1964. 30cm. 33t/m, duflanka.

David K. Jordan. The sounds of the Esperanto alphabet explained to speakers of English. Pĝ. 37-42 en: Esperanto — the solution to our language problems, kompilita de Rudiger kaj Vilma Eichholz. Bailieboro, Ontario: Esperanto Press, 1981. 472 pĝ.

Kálmán Kalocsay. Esperanta parolo. Pĝ 116-121 en: Lingvo – Stilo – Formo. Budapest 1931. Ofsete represita: Librejo Pirato 1963. 142 pĝ. Kálmán Kalocsay, Gaston Waringhien, Roger Bernard. Parnasa Gvidlibro. 3-a eldono. Pisa: Edistudio; 1984. 205 pĝ.

Naokazu Kawasaki. Esperanta elparolo kaj japanoj. Esperantologio 1959 novembro; 1:63-64

Ivo Lapenna Retoriko 3-a eldono Rotterdam Universala Esperanto–Asocio; 1971 294 pĝ.

Albert Lienhardt. Modela prononco de la interlingvo Esperanto. Scienca Revuo. 1973; 2/3 (100/101): 101-116.

François Lo Jacomo. Liberté ou autorité dans l'évolution de l' Espéranto. Paris: aŭtor-eldono; 1981. 384. pĝ.

Geraldo Mattos. Laborplano de la sekcio pri prononcado. Cirkulero de la Akademio de Esperanto. 1987.06.02; 155, Aldono E:2

Geraldo Mattos. Teksto. Cirkulero de la Akademio de Esperanto 1989.03.15; 161:1-2.

Victor Sadler. Internacia parolo. Gramofondisko, monofona, Universala Esperanto–Asocio, Rotterdam, 1964, represita 1969. 18 cm. 33 t/m, duflanka.

Bruce Arne Sherwood. Variation in Esperanto. Studies in the Linguistic Sciences. 1982a printempo; 1:183-196.

Bruce Arne Sherwood. Statistical analysis of conversational Esperanto, with discussion of the accusative. Studies in the Linguistic Sciences. 1982b printempo; 1:165-182.

W.A. Verloren van Themaat. La frazakcento en Esperanto. Scienca Revuo. 1975; 4/5 (114/115):185-198.

Gaston Waringhien kaj Kálmán Kalocsay. Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. 4-a eldono. Rotterdam. Universala Esperanto–Asocio 1980. 599 pĝ.

John C. Wells. Esperanto pronunciation disc. Gramofondisko, monofona, Bracknell: Country Recording Service, 1969. 18 cm. 45 t/m, duflanka.

John C. Wells. Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. Rotterdam: Universala Esperanto–Asocio; 1978. 76 pĝ.

John C. Wells. Hispanaj kaj anglaj problemoj en la prononcado de Esperanto. pĝ. 773-782 en: Serta Gratulatoria in honorem Juan Regulo. La Laguna: Universidad de La Laguna; 1987. 790 pĝ. Vol.II: Esperantismo.

Richard E. Wood. The development of standard phonology in Esperanto. pĝ. 58-76 en: Studoj pri la Internacia Lingvo redaktita de Michel Duc Goninaz. Gent: AIMAV; 1987. 152 pĝ.

L.L.Zamenhof. Lingvaj respondoj. Konsiloj kaj opinioj pri Esperanto. 6-a eldono. Editorita de Gaston Waringhien. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj; 1962. 130 pĝ.

Bernard GOLDEN
Damjanich u. 1/c.I.8.
H - 8200 Veszprém
Hungario

ARANĜOJ POR JUNULOJ KAJ INSTRUISTOJ EN 1993

Majo 20-22: Sukcena bordo, Liepaja, Latvio. Unu el la temoj estos instruado, kun modellecionoj. Esperanto-Buroo Kemespo, Abonkesto 1064, Liepaja 16, LV-3416 Latvio.

Majo 27-30: Intensiva kurso pri komunika instruado. Gvidos Stefan MacGill, laŭ la lernolibro *Tendaraj tagoj*. E-Centro Poprad, Sobotske nám 6, Poprad.

Junio 12-17 Somera universitato en Lappeenranta, Finlando. Gvidos Andrzej Pettyn. Informoj: Irja Miettinen, Yrjönkatu 6-8 A 1, SF-53600 Lappeenranta.

Junio: 20-30 Cseh-metoda kurso B-grada, organizita de la pedagogia sekcio de EAE (E-Asocio de Estonio) en Viljandia. Gvidos: Ewa Bondar. Kurskosto $30, loĝigo kaj manĝoj ĉ. $15 tage. Informoj: Rein Saag, p.k. 82, EE-2900 Viljandi, Estonio.

Junio 28-Julio 16: Someraj Esperantaj Kursoj en la Ŝtata Universitato de San Francisko. Gvidos: David K. Jordan, Mark Fettes, Boris Kolker. Detaloj de Cathy Schulze, 410 Darrell Road, Hillsborough, CA 94010.

Junio 28-Julio 2: Ierneja kurso en Tampere. Gvidos E. Farkas-Tatár, Luc Feidangai.

Julio 4-9: Somera universitato en Jyväskylä. Informoj pri ambaŭ S. Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, SF-40640 Jyväskylä.

Julio 8-4 aŭg: Kastelo Grésillon, F-49150 Baugé, Cseh kursoj A kaj B. Gvidas Eva Bondar kaj Kimie Markarian.

Julio 9-17: Intensiva Du-semajna kurso por Instruistoj: ILEI/KCE, La Chaux-de-Fonds, Svislando. Gvidos d-ro Duncan Charters, profesia trejnisto de lingvo-instruistoj en Usono. Kultura Centro Esperantista, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Julio 17-18: Sesio de la elementa kaj meza lingvo-ekzamenoj de UEA/ILEI, en KCE. Nedeviga prepar-kurso estos ofertata antaŭe de s-ino Smidéliusz Katalin (Hungario).

Julio 18-21. Dekdua Internacia Literatura Forumo. Barcelono. Organizas Kataluna E-Asocio kaj LF-Koop. Informoj: LF-Koop, CP 232, CH-6830 Chiasso 1, Svislando.

Julio 22-27. Lingvistikaj aspektoj de Esperanto. Seminario por lingvo-instruistoj gvidota de Blazio Vaha. La kvinpetalo, F-86410 Bouresse, Francio; tel. (+33)49428074.

Julio 24-31. Universala Kongreso de Esperanto, Valencio. Informas UEA.

Julio 31-6 Aŭg.: 27a Konferenco de ILEI kune kun la 2a ILEI-Gimnazio. La Paterna, Valencio, Hispanio. Aliĝilo ĉi-numere.

Julio 31-8 Aŭg.: Internacia Junulara Semajno, en kastelo Mikosszéplak en sud-okcidenta Hungario. HEJ, Tibor Budai, pk. 263, H-8901 Zalaegerszeg. karavano al...

Aŭg 7-14: 49a Internacia Junulara Kongreso, Vraca, Bulgario. Aliĝiloj de la CO de UEA au LKK: pk 26, BG-3000 Vraca.

Aug 6-13: Familia renkontiĝo. Sümeg, Hungario (apud Lago Balatono). Plena partopreno 130 DEM. Informoj: Ernó Csiszár, Erdódy Pálffy Tamás u. 25 u. 16, H-8100 Várpalota, Hungario.

Aŭg 19-31: Por la instruantoj, pedagogia helpo, instruiloj, kursoj. Kastelo Grésillon. D-ro Charters gvidos 19-23 aŭg.

Aug 21-28: Internacia Studsemajno, Habères-Poche, 25km de Thonon en la francaj alpoj. Informoj: Centre Culturel Esperanto, 5, Rue du Docteur Roux, F-34000 Montpellier, Francio; tel. (+33) 67 54 15 43.

Sept. 4-11. Simila studsemajno en Sete, apudmare. Gvidantoj: Babin, Moirand, Favre, MacGill. Sama kontakt-adreso.

Okt. 14-17: Intensiva kurso pri komunika instruado (vidu sub majo.)

Aliĝiloj por la instruistaj kursoj de ILEI aperis en IPR 92/4.

Hungara instruado: La jara enketo trovis 1320 studentojn de Esperanto, 136 bazlerneje, 377 postbaze (klasoj 5-8), 590 mezlerneje, 94 altlerneje kaj 123 universitate. El tiuj 33 sekvas instruistan trejnadon (ĉefe en instruistaj trejnejoj (Szombathely, Eger, Györ kaj Sarospatak). La instruado okazis en 62 lernejoj, inkl. du universitatoj (Budapeŝto, Debrecen).

Latin-ameriko: Kurso de kaj pri Esperanto estas ofertata oficiale en la Universitato de Kostariko sub gvido de Jorge A. Leoni. • Ni ricevis raporton pri la sukcese okazinta Argentin-Brazila dua interlanda konferenco pri instruado. Spacomanko devigas nin lasi ĝin ĝis 93/2.

Danlando: Seminario de DEA en Kullerup planis inform-kampanjojn, kaj rekomendis intensigi instruistan edukadon kaj organizi ĉiujare semajnfinon por instruantoj. ILEI volonte fondos sekcion en Danlando!

Monda Kunagado stimulas edukadon

En la 18 monatoj de sia ekzisto, la esperantista Unesko-asocio Monda Kunagado por Eduko, Scienco kaj Kulturo vastigis sian agadon al ĉiuj kontinentoj. MK serĉas kunlaboron kun organizaĵoj ekster la Esperanto-movado.

En marto 1993, la Konsilantaro de MK kunsidis kun pluraj aktivuloj en Berlino. Oni konstatis firman bazon de la asocio: ĉ. 300 membroj en pli ol 40 landoj, sufiĉaj enspezoj por kovri la bazajn servojn, kaj kreskanta reto de perantoj kaj aktivuloj. La revuo *Monda Forumo*, redaktata de Mark Fettes, aperas kvarfoje jare kaj traktas plej diversajn internaciajn temojn: ekz. la 'novan mondan ordon', la laboron de UN pri la medio kaj evoluigo, strategiojn por klerigo kaj pacedukado, kaj la agadon de Unesko kaj de MK mem.

La ekzistokialo de Monda Kunagado, tamen, troviĝas en ĝiaj projektoj. Sukcesa estis seminario pri minoritataj lingvoj kaj kulturoj en Nordio, pasintjare organizita kun la nordiaj E-asocioj kaj la Samea Societo de Gotenburgo. Tia agado daŭros sub la gvido de Märtha Andréasson, kiu aperigos raporton pri la seminario (Esperante kaj svede) kaj antologion de samea kulturo (Esperante), kaj stimuli la organizon de similaj seminarioj en aliaj regionoj. Daŭras projekto de Ulrich Becker, kolekti skizojn pri la vivo de ordinaraj esperantistoj en diversaj partoj de la mondo por plivastigi komprenon pri ties kultura kaj socia diverseco.

Grandajn eblecojn prezentas nova projekto de Annsibyll Kamphausen. Esperanto-klubo en la benina vilago Ĉaĉu (naciskribe: *Tshatshu*) komencis ĝardenkulturan projekton, por kiu ŝi trovis financan kaj teknikan subtenon de internacia virina organizaĵo. Monda Kunagado celos kunlaborigi siajn membrojn kun la ĉaĉuanoj pri ĝardenkulturado, plibonigo de sanservoj, edukado kaj la vilaĝa ekonomio. Se funkcios tiu eta modelo, oni esperas pri ĝia plivastigo al aliaj vilaĝoj, en Afriko kaj eble alikontinente.

Vastajn perspektivojn havas Lev Medvedev, la organizinto de la rusa AIS-sesio (jarŝanĝe 1991-1992) pri 'lingvo-kulturo-ekologio'. Fine de 1992, Unesko enmetis la aranĝon en la programon de la Monda Jardeko por Kultura Evoluigo kaj kuragiĝos ĝian disvolvon. MK akceptis tiun taskon, kaj klopodos organizi similajn konferencojn en aliaj mondopartoj. Medvedev gvidos seminarion pri ekologio en KCE (La Chaux-de-Fonds) de la 10-14 aŭg. 1993.

Responde al kreskantaj zorgoj inter eŭropaj esperantistoj, MK okazigos praktikan seminarion pri 'trejnado kontraŭ rasismo' en aŭtuno 1993, sub gvido de profesia aktivulo sur tiu kampo, Elisabeth Schwarzer. Ĝis 15 esperantistoj povos, per tritaga intensa klerigado, profundigi sian komprenon pri la fontoj de rasismo kaj lerni kiel malfortigi kaj forigi ilin. Schwarzer estos unu el kvar kontribuantoj al la Tago de la Paco en la valencia UK, sub la temo 'Klerigo por paco en la 21a jarcento'. La Tago, kiun organizas MK, krom socia paco traktos pacajn rilatojn kun proksimuloj, pacon kaj justecon en monda skalo, kaj la ekologian dimension de paco kaj sekureco. Alia aranĝo de la Tago estos la 2a Foiro de la Paco, kiu kunigas aktivulojn pri tutmondaj prob-

lemoj por komuna diskutado kaj planado. Detaloj pri ĉi tiuj arangoj troviĝas en *Monda Forumo*, kiun ricevas ĉiu MK-membro kontraŭ 30 nederlandaj guldenoj jare (kelklande malpli alta kotizo). Por provekzemplero kaj aliĝilo skribu al Ulrich Becker, (adreso sube) aŭ al via landa peranto.

Mark Fettes

PERANTOJ DE MONDA FORUMO

Aŭstralio: Libroservo de Aŭstralia E-Asocio, T. Elliott, P.O. Box 230, Matraville, NSW 2036.
Brazilo: Ursula Grattapaglia, Fazenda-Escola Bona Espero, BR-77620 Alto Paraiso (GO).
Bulgario: Eva Bojaĝieva, str. Generalo Skobolev 8, BG-4000 Plovdiv, Bulgario.
Finnlando: Jukka Laaksonen, Uudenkylankuja 2 B 11, SF-33530 Tampere.
Germanio: Ulrich Becker, Plauener Str. 39, D-O-1092 Berlin.
Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo-to, 162.
Kanado: Mark Fettes, #3-332 Cumberland Street, Ottawa, Ontario, Kanado K1N 7J2.
Katalunio: Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 407, E-08200 Sabadell.
Kroatio: Maria Belosevic, Sveti Duh 130, Crnomerec, 41000 Zagreb.
Novzelando: Gwenda Sutton, 12c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington.
Pollando: Ewa Siurawska, ul. Dickensa 29 m. 216, PL-02-382 Warszawa.
Rusio: Lev Medvedev, pr. Mira 196-44, 129128 Moskva.
Svedio: Märtha Andréasson, L. Tolsereds väg 2265, S-425 42 Hisings Kärra.

Proponoj pri perado en aliaj landoj estas bonvenaj, ĉe la adreso de Ulrich Becker.

RAPORTO PRI LA ESTRARKUNSIDO DE ILEI

26 — 28 marto 1993 en klubejo 'Esperejo' en Budapeŝto

Prezidas Stefan MacGill (SMG), partoprenas prof. Ronald Glossop (RG), Bertil Andreasson (BA), d-ro Till Dahlenburg (TD), s-inoj Marija Beloŝevič (MB) kaj ekde sabato Barcsay Zsuzsa (BZs). Helpis kaj parte partoprenis s-ino Esperantina Mirska (EM). Gasto estis s-ro Szilvásy László, redaktoro de 'Eventoj', kiu teknike helpis la kunsidadon.

Ne povas ĉeesti estraranoj d-ro So Jin Su (SJS) kaj prof. Zhang Danchen (ZDC).

Ĉi tio estas forta koncizigo de 6-paĝa protokolo pretigita en la 28a de marto kaj tuj sendita al ĉiu sekciestro, reprezentanto, komisiito kaj aliaj koncernatoj. Ĝi servu ankaŭ kiel jarraporto de nia agado en 1992/93.

1. Landaj sekcioj: (MB)

1.1 Aliĝoj: Kuba aliĝpeto pretas por Paterna, post malsufiĉa skriba voĉdono (nur 11 sekcioj respondis). MB esploros pri aliĝoj el Islando, Albanio, Ukrainio kaj Litovio.

1.2 Reprezentantoj: Ĉiuj nunaj reprezenantoj estas rekonfirmitaj, kio šarĝos la koleghelpan kason. Nova reprezentanto por Kostariko akceptita. BA esplorados pri Danlando, MB pri Rusio, Vjetnamio kaj Madagaskaro. Rep. adresŝanĝoj: Islando, Albanio.

1.3 Nefunkciantaj sekcioj: Japanio restas nefunkcianta, kaj estos forstrekita en Paterna se SJS ne povas raporti progreson. Sud-Afriko ekde nun vaku; MB provadu havi vivsignon.

1.3.1 Sekciaj apartaĵoj: La IJK donas al *Bulgario* eblecon unu jaron kotizi kaj aboni, MB aranĝu tion. SMG kaj Soponyai Maria provos solvi *Rumanion*. En *Pollando*, la nove nomita sekciestro devis demisii pro sanstato. La sekcio kunsidis 15-ope en Vroclavo februare. Nova prez. kaj sekr. elektiĝis, sed neklaras, kiu estu sekciestro. En *Portugalio* venis propono por sekciestro, subtenata de PEA, sed ni havas sekciestron. MB kaj SMG korespondas. En *Germanio* nun ekzistas komuna instruista sekcio kun unu sekciestro. TD konfirmos, kiu. SMG raportas pri renkontiĝo kun Thomas Pusch kaj Klaus Dahlmann en la GEJ/GEA sidejo februare. Rezulto povus esti kontribuo de ILEI al seminario por aktivula trejnado en aŭtuno 1994. En *Venezuelo* la sekciestro s-ro Blazquez demisiis, s-ro Bachrich pretas transpreni.

1.4 Membronombro 1992.: BA prezentas statistikon, kun kresko de 6% kompare kun 1991. Elstaras Italio (102), Germanio (98), Nord-ameriko (85), Ĉinio (67) kaj Nederlando (59). BA traktos kun la ĉeĥaj, estonaj kaj koreaj sekcioj pri transpago.

1.5 Membro-varbado, membrokartoj. La principa decido presigi membrokartojn restas valida. Manko de laborfortoj pretigi, presigi kaj administradi bremsas.

1.6 Konkurso "LS de la jaro". MB preparas la jaran demandilon al sekcioj. SMG kontribuis du paĝojn, unu pri livero de laborfortoj el la sekcioj al la internacia ILEI, alia pri instruistaj kursoj. Dissendo el Zagrebo.

1.7 Konsistigo de la komitato: Nur 11 sekcioj skribe nomis komitatanojn (20 entute). (BR, GB, CN, Ĉeĥio, Kroatio, NL, Nordameriko, PL, Slovenio, Venezuelo.) Ceteraj sekcioj estis kaj estas urĝe petataj sendi nomojn al la sekretario. Post kontrolo de la rajtataj nombroj kaj kompletigoj, listo de komitatanoj aperos en IPR 93/2. La Estraro proponas, ke sekcioj, kiuj ne skribe nomas siajn komitatanojn ĝis plejlaste la komenco de la konferenco ne havu komitatajn lokojn. Anstataŭantoj devas esti skribe anoncitaj.

1.8. Honoraj Membroj: La Estraro havas unu proponon, kiun ĝi nun pretigas. Aliaj proponoj ne venis ĝis la limdato.

2. Komisionoj, oficejo, planado.

2.1 Komisiitoj: Pro personaj kialoj demisiis s-ino Marie Hunninck (Francio) el la ekzamena sekretarieco. Provizore la laboro revenos al Budapeŝto, sed la Estraro urĝe serĉas novan oficanton, eble en apudeco de prezidanto TD. Demisias el la *statistika* ofico s-ro Germain Pirlot, kiu ne plu eldonos la jarajn raportojn pri universitata instruado. Se alia komisiito ne troveblas, ILEI provos plenumi parte tiun laboron en Budapeŝto per komputila datum-bazo, lige kun la ĉiujara kontaktilo\enketilo. La komisiono pri *informado* kaj pedagogia servo (vidu proponon por laborplano en IPR 92/3, p. 37) ne havas gvidanton, kvankam s-roj Klag kaj Pirlot pretus kunlabori. La Estraro ne trovis gvidanton.

La komisiito pri *terminologio* demisiis per letero alveninta meze de la kunsidoj. La Estraro serĉos alian komisiiton, kaj netrovinta, provos konvinki s-inon Smidéliusz daŭrigi la laboron.

Tiu lavango de preskaŭ samtempaj demisioj estas unika por la Ligo kaj tre zorgiga. La Estraro provos trovi solvojn per personaj kontaktoj, tamen konsentas aperigi en IPR proponatajn task-priskribojn por ĉiuj vakaj lokoj. (vidu protokolfine). En la sekcia demandilo, ĉiu sekcio estos petata proponi kandidatojn por la vakaj lokoj.

Sekvas diskuto pri la honorariado de komisiitoj. SMG favoras se tio malŝarĝas iom la Estraron kaj la budapeŝtan 'oficejo'n kaj kondukas al konkretaj rezultoj. BA tamen atentigas pri la deficito kaj malboniĝanta financa situacio. Li kaj la ceteraj estraranoj aliĝas al la starpunkto, ke laboro por Esperanto devus esti esence libervola, kiel ĉe estraranoj, kaj ke ni limigu honorariadon al la 'oficejo' en Budapeŝto.

La demando unuavice rilatas al ekzamena sekretario, plej urĝe bezonata, ĉar sesioj kaj kandidatoj estas anoncitaj kaj bezonas prizorgon. Ĉiu komisiito povas rericevi normalajn elspezojn (afranko, kopioj ks.) interkonsente kun la kasisto. Decidite, ke, se fine de jaro la ekzamenoj estis organize kaj finance sukcesaj, la Estraro povos aljuĝi al la ekzamena sekretario bonuson iuspecan. Ceteraj ekzamenantoj kaj regionaj kunordigantoj kovru kostojn el kotizoj enkasigitaj dum sesioj, kiuj estu laŭeble memfinancaj.

2.2 Raporto pri 'kerno' kaj plia planado. Komence de la deĵorperiodo ni lanĉis la nocion de 'kerno', kiu konsistus el trideko de aktivaj homoj el la pli fortaj sekcioj, kunlaborantaj internacie, dividante la laboron. Laŭ la demisioj de komisiitoj, la manko de internacia laboro ene de sekcioj, la limigitaj eblecoj šarĝi la estraranojn kaj la budapeŝtan stabeton ankoraŭ pli, konstato ke ILEI frontas laborfortan krizon apenaŭ troigas. Per nunaj rimedoj, multo el la kuranta trijara laborplano restos nefarita. Ĉi tiu temaro okupis centran lokon tra la kunsido, releviĝante sub diversaj formoj en pluraj tagordaj punktoj. Ĝi ĉef-rolu en la komitato en Valencio kaj sekcioj ĝis tiam serioze alfrontu la demandon.

2.3 'Oficejo' kaj honorarioj. La oficejo en Budapeŝto konsistas el kela ĉambro, kie ILEI havas propran šrankon, laseran printilon kaj uzeblon de komputilo. La Estraranoj kunsidis tie. Ĝi ne estas oficejo kun mebloj kaj dosieroj konstante alireblaj; fine de ĉiu laborsesio ĉiu materialo devas esti forpakita, ĉar la ĉambro havas aliajn uzantojn. La tre

modesta lupago spegulas tion. La termino 'oficejo' eble elvokis troigan imagon ĉe la membraro. Kutime la honorariito kaj prezidanto povas ne pli ol 3 ĝis 5 horoj semajne kune labori tie, kaj ne pli ol 10 dise. Multa laboro devas okazi kaj multaj dosieroj plue troviĝi en privataj hejmoj.

La Estraro decidis pli detale reguligi la plenumon de laboro flanke de la honorariito cele al 20-hora laborsemajno. La Prezidanto, Vic-prezidanto kaj kasisto ĉiun trian monaton ekzamenos laborresumojn kaj surbaze de tio kaj la financa stato de la Ligo, decidos ĉu daŭrigi la honorariadon. SMG pretigos pli detalan posten-priskribon kaj esploros aliajn manierojn elkalkuli la honorarion.

3. Financo (BA)

3.1 Kontoj 1992: BA prezentas provizoran kalkulon. La spezokonto havas rimedojn de 75.000 SEK kaj elspezojn de 89.000 SEK, sekve ni antaŭvidas malgajnon de ĉ. 14.000 SEK. (t.e. 16% de la jara spezsumo kaj 10% de la kapitalo). Repagota subvencio kaj debetigo de lasera printilo deskribebla tra kelkaj jaroj influis, tiel ke pli realisma deficito estas ĉ. 8.000 SEK. Restas nepagitaj fakturoj de la libroservo el 1992 en valoro de ĉ. 1300 GLD. BA persekutos la koncernatojn.

Zorgiga estas ĉ. 20%a kresko en la kostoj de IPR, parte pro reala altigo, parte pro malfortigo de la sveda krono. Unuafoje ĝiaj kostoj signife pli altas ol la sumaj enspezoj de kotizoj. Necesos en 1994 ĉu tranĉi la nombron da paĝoj en IPR, ĉu altigi la kotizon, ĉu trovi alian solvon. Se kotizaltigo, la estraro nun imagas 20 NLG aŭ 80 SEK por la internacia kotizo, sed studos kurzojn kaj evoluon ĝis Paterna por tie fari proponon.

3.2 Buĝeto 1993: Laŭ rezultoj 1992, la Estraro modifas buĝeton 1993 (v. IPR 92/3):

Rimedoj: membrokotizoj, 3 mil pli, eldonado 5 mil malpli, kompenso de UEA aŭ Fondaĵo Szerdahelyi pro instruistaj kursoj: 8 mil (nova rubriko). Sume pliigo de rimedoj de 6 mil, t.e. 76.500 SEK.

Kostoj: Instruistaj kursoj (ĉefe stipendioj) plus 4 mil, IPR plus 5 mil, Kotizo FA de UEA, plus 500. Sume plus 9.500 SEK, ĝis 94,300 SEK. Sekve la buĝetita deficito kreskas de 12.300 SEK ĝis 17.800 SEK (ĉ. 4.300 NLG)

3.3 Fondaĵo Szerdahelyi Ĝi altiris malmultajn donacojn. Ĝia unu subvencia agado (Interlanda konferenco en Argentino) ne pruviĝis necesa, do ĝia kapitalo kreskis iomete. En 1993 ĝi devos kovri kostojn de stipendioj por instruistaj kursoj, se de UEA ne venas sufiĉa sumo. Ĝi apogu la Duan Gimnazion se necese. Aliaj proponoj ne estas.

4. Ekzamenoj (TD)

4.1 Sesioj el 1992. SMG raportas. Plej multnombra estis la sesio en Qingdao, Ĉinio kun 36 sukcesintoj (22 el. + 14 mez.); plie Vieno (9+12), San Francisko (2+3); Bulgario (2 mez); Kroatio (1 el.); kaj Svislando (KCE) kun laŭdire kvar kandidatoj, sed protokolo ne ricevita. Sume 68 (+4?) sukcesintoj el 22 landoj. Protokolo ĉi-numere.

4.3 Sesioj en 1993: KCE (julio), Valencio (julio, se sufiĉaj helpantoj troveblaj), Jagodina, Serbio (julie), Barlaston, Britio (aŭguste), Vraca en IJK, Bulgario (aŭg), Gresillon (aŭg-fine), Zagrebo, Kroatio (dec.) En 1994, somere: Finnlando.

4.4 Verkado de novaj testoj: Novaj fortoj urĝe bezonataj. TD eklaboros.

4.5 Regionigo de la administrado: La deziro por sesioj konstantas; la oficejo en Budapeŝto apenaŭ imagas, kiel ĝi plenumos la administradon de la someraj sesioj. Se pliaj fortoj ne troveblas de ILEI aŭ UEA, necesos fermi la ekzamenojn dum iom da monatoj, dum kiu la organizado estu ordigita kaj fortigita. Multaj petoj por sesioj venas el foraj kontinentoj, kie ne eblas el Eŭropo organizi ekzamenantojn. Tial SMG proponas starigi regionajn kunordigantojn kun grado de memstareco sub la tegmenta respondeco de la sekretario kaj prezidanto. Tiu memstareco rilatu al verkado de testoj, rajto rajtigi ekzamenantojn en la regiono, tenado de atestilo-stoko. Proponataj regionaj gvidantoj: *Azio*: Prof. Zhang Danchen. (jam modele funkcias); *Latin-ameriko*: Atiljo Orellano-Rojas, *Afriko*: Laŭ interkonsento kun Hans Bakker (Rojas planas pasigi 6 monatojn tie kaj povus kun afrikaj rajtigitotaj okazigi sesiojn.)

4.5 Supera nivelo ILEI proponis en sept 92 al UEA por unu el la tri prezidantoj d-ron Till Dahlenburg, biografie motivita. UEA estis petita proponi la pliajn du prezidantojn kaj sekretarion, por kiu ILEI ne havas kandidaton. Ĝis nun UEA ne povis fari proponon. Trovo de tiuj kvar ŝlosilaj homoj estas minimuma kondiĉo por pluiro. Se ILEI trovus unu sekretarion por administri ĉiujn tri nivelojn, la argumento por honorario estus

multe pli forta. TD reformulos postularon laŭ sia skemo kun intertempe diskutitaj modifoj.

4.6 Ekzamena libreto. Tio elĉerpiĝis, estis populara kaj enspeziga. ILEI preparu novan, se eble ĝis Valencio. Ĝi ampleksu min. 36 paĝojn, enhavu la regularojn, postulojn ktp., sed anstataŭ specimenaj ekzamentestoj estu prepar-ekzercoj por ĉiuj niveloj. Verku TD, EM, SMG. ILEI mem eldonu.

5. Instruado (ZsB, TD, SMG)

5.1 Instruistaj kursoj SMG raportas, ke la preparoj por kurso Charters bone progresas per intensiva korespondado. Nur du aliĝoj atingis ILEI, ambaŭ el NL. Ok petoj por stipendioj alvenis: 4 el Albanio, 1 el Rumanio, 1 el Tanzanio, 1 el Hungario, 1 el Kubo. SMG malkovros, kiom da subteno povos veni de UEA aŭ de aliaj fontoj kaj kiom la koncernatoj povos kontribui al vojaĝkostoj antaŭ ol findecidi pri la akceptitoj. Svisaj vizoj malfacile akireblos por pluraj.

Por la kursoj en Poprad venis al ILEI neniu aliĝo aŭ stipendipeto.

BZs proponas ligi instruistajn kursojn kun nia konferenco kaj IMS, kie partoprenantoj estas garantiataj. Demandofolio al sekcioj klopodas arigi informojn pri la plej deziratai lokoj, sezonoj kaj daŭroj de ILEI-kursoj, trovi sekciojn, kiuj volus gastigi kurson kaj taksi la perspektivojn por oficiala apogo.

Por konvene proponi instruistajn kursojn al sekcioj, LA de UEA, E-centroj kaj oficialaj instancoj, ILEI eldonos broŝuron prezentante dekon da kursgvidantoj kun koncizaj biografio kaj priskribo de la kursoj proponeblaj kaj la kondiĉoj bezonataj. BZs kontaktos eblajn gvidantojn por akiri tekstojn. La broŝuro inkluzivu informojn pri la pedagogiaj brancoj de kursoj de ELTE kaj similaj.

5.2 Datum-bazo de instruado: La budapeŝta oficejo disponas pri la trikampa komputila programo WORKS, kiu kunigas tekst-redaktilon, datum-bazon kaj financ-tabeladon. Ni registras abonantojn de JA. Aldoniĝu registro de aktivantaj instruistoj, instruistoj kapablaj sed ne povantaj instrui, lernejoj pretaj instrui, instruistoj pretaj vojaĝi internacie ktp. La ĉiujara kontaktilo de ILEI por lernejoj, kaj la enketado de s-ro Pirlot aldoniĝu al la datumbazo.

5.3 Vidbenda projekto (IEI): La konkurson anoncitan de ILEI gajnis Koutny I. kaj Galor Z. surbaze de skemo kaj unu ellaborita leciono. IEI petas ilin daŭrigi la verkadon. SMG estis akceptita de ges-roj v.d. Horst en Hago februare kaj diskutis la projekton. Celo estas registri unu lecionon ĝis Valencio kaj tie prezenti ĝin. ILEI subtenadas laŭeble.

5.4 Instrurajtigaj atestoj (aldonita punkto): Ripete atingas ILEI petoj por agnoskigo de instrurajtigo (plej ofte el foraj landoj). Unu solvo estas revivigo de kursoj Szanser, se en Litovio aperos ŝia verko. Duan eblecon proponas TD kaj BZs, aldoni instrurajtigan parton al la formata supera ekzameno, (kun devo gvidi model-lecionojn). Dume ILEI povas fine de instruistaj kursoj doni atestilon pri kontentiga partopreno. Eldoni atestojn sen partopreno en kurso aŭ ekzameno ILEI ne emas. Ĉiuj supraj solvoj suferas pro manko de oficiala rekono.

6. Konferencoj (MB, BA, TD/BZs)

6.1 Konferenco Valencio/Paterna: Pro malfrua apero de la aliĝilo, nur deko da aliĝoj alvenis. Ne estas pli novaj informoj ol tiuj en la cirkulero al sekcioj de 5 mar 93. Por la programo BZs kontaktos eblajn prelegantojn. Charters kaj SMG konceptos panelan diskuton kun forumo, simile al tiu en UK. SMG kaj MB rilatas kun la hispana sekcio pri surlokaj helpantoj, informado (intervjuoj) kaj gastoj en la inaŭguro.

MB eble vojaĝos alicele al Hispanio maje; se jes ŝi vizitos Valencion, vidos la ejojn kaj firmigos la organizadon.

TD, BZs kaj RG ne povos ĉeesti la konferencon. SJS ne indikis ankoraŭ.

6.2 Gimnazio: La neĉeesto de BZs estas tre bedaŭrinda. Ŝi provadas trovi surlokajn organizantojn. Ŝi kompilos la programon, skribos al potencialaj gimnazianoj kaj trovos instruistojn. Antaŭvidataj estas Atiljo Orellano-Rojas (E-lit. + lingvo); Matematiko: Joy Markarian; Geografio: SMG; Muziko: Rita kaj Gerog Rössler, Ludoj: Gilena Tilleux. Venis du aliĝoj (Norv. kaj Kroatio).

6.3 IMS: La IMS en Zagrebo estis nuligita pro manko de partoprenantoj; vizaj obstakloj malhelpis alvenon de dekkvinopa albana grupo. BZs proponas organizi la dekan IMS en Estonio en 1994 printempe. Ŝi kontaktos Linnamägi Madis kaj Eva Otse, cele al pretigo de aliĝilo/informilo ĝis Valencio. La temo restu tiu de Zagrebo. Poste, Ukrainio konsidereblas por IMS. Albanio ne maturas por IMS, sed instruista kurso tre uti-

los. BZs/TD proponos tion por sept/okt 1993. ILEI kovru koston de vojaĝo plus materialoj.

6.4 ILEI-partopreno en kongresa temo UK Valencio: Temo: 'Klerigado por la 21a Jarcento'. UEA akceptis d-ron Duncan Charters por reĝisori la temon. Li enkondukos ĝin en la inaŭguro kaj faros plian prelegon. Oko da aliaj prelegoj estas proponitaj, almenaŭ unu el ILEI medio. Pliaj proponoj bonvenaj. Okazos panela diskuto kun partoprenanta diskutado. Marde 'Tago de la Lernejo', krom la ekzamena registriĝo kaj antaŭtesto, okupiĝos nur pri la UK-temo.

6.4.1 UK cetere: La ILEI kunsido (kiu traktos edukan rezolucion) dimanĉ-posttagmeze. Ekzamenoj marde, ĵaŭde, vendrede. Eseajn temojn ni disdonu marde antaŭteste, oni verku ilin ĝis ĵaŭdo (legeble!). Pro malmultaj estraranoj en Valencio ege gravos helpantoj por la ILEI-budo, la ekzamenoj kaj la realigo de la kongresa temo. Bude ni varbu por la tuja konferenco, tiu en Koreio kaj IMS.

6.5 Konversaciaj rondoj en Valencio: kvar gvidantoj bezonataj; disponeblos klasĉambroj, ĉiu gvidanto havos ne tro da babilemuloj. Proponoj venis de Bacev kaj Rojas. ILEI rekomendos post alveno de pliaj.

6.6 Konferenco Seŭlo: Aliĝilo kaj informilo nepre pretu antaŭ Valencio! Laŭ letero el 29 julio 1992: datoj 30 julio ĝis 6 aŭg, tuj post UK, paralele kun IJK, en Universitato Kangnam, 30 km. sude de Seulo. Tri loĝigaj eblecoj: studenta hejmo surloke (ne klimatizita), prezo ne indikita. Korea gastejo, 5 minutoj for buse, ĉ. $30 tage en 2-persona ĉambro. Hotelo 10 minutoj for, $55 - $70 por du-lita ĉambro. (Prezoj kalkulitaj al USD kaj altigitaj pro intertempa inflacio). Impona korea folklora vilaĝo apudas kiel ekskurs-celo.

MB kaj SMG provos urĝe havi sufiĉajn informojn por fiksi kotizon kaj aperigi informilon/aliĝilon ĝis Valencio. Limdato: 31 majo 1993. Dezirindas partopreno en Valencio de SJS por prezenti la landon, konferencejon per broŝuroj, afiŝoj, lumbilda prezentaĵo k.s. Se ne eblas korea delegacio tion prizorgu! La informilo inkluzivu informojn pri flugkaravanoj de UEA kaj aliaj. ILEI eventuale kunlaboru kun iuj por formi ILEI-grupojn.

Nur TD el la eŭropaj estraranoj ne povos ĉeesti, la ceteraj ĉu planas, ĉu aspiras, ĉu sopiras. Forte dezirate, ke ZDC ĉeestu, la akceptita regulo pri estraraj vojaĝoj servos tiucele. Pri temo SMG korespondos kun SJS. La Estraro imagas 'la azia kontribuo al tutgloba edukado kaj kulturo', aŭ 'edukado en Azio – kion alikontinentanoj povus el tio lerni?' sed ne proponas nun precizan vortumon, kaj invitas proponon el Koreio. Necesas decidi ĝis 31 majo 1993.

7. Statutoj, regularoj

7.2 **Estrara rotacio** La Estraro decidas jene: 1993 MacGill, Belosevic, 1994 Glossop, 1995 Dahlenburg, Andreasson. Necesos scii la dezirojn de ZDC kaj SJS. Minimume unu devos demisii en 1994.

La Prezidanto motivigas sian demision en 1993 pro familiaj kaj profesiaj kialoj, kiuj tro limigas kontaktadon kun sekcioj kaj vojaĝoj reprezenti la Ligon, kiu prefere havu pli mov-kapablan prezidanton. Li emas ne rekandidatiĝi; decido dependos je la ebleco ĝis julio signife fordelegi diversajn taskojn (ekzamenoj, IPR, *Juna amiko*, k.m.a.). Vidu la alvokojn protokolfine. Prof. Glossop anoncas sian intencon, pro antaŭ-emeritigaj devoj, ne rekandidatiĝi en 1994. La Estraro petas s-inon Barcsay trovi helpantojn kaj serĉi taŭgajn kandidatojn kaj ĉiajn laborfortojn.

8. Eksteraj rilatoj/ informado (RG)

8.1 Kunlaboro kun UNESKO. RG kompilis liston de esperantistoj kun adekvataj spertoj por proponi al UNESKO. Spite petojn al ĝi, li ne ricevis la raporton pri 'Edukado ĝis la 21a jarcento'. Li provos aliri la komisionon, sed dubas pri sukceso, ĉar ĝi konsistas el registaraj reprezentantoj.

8.2 Projekto Symoens/Erasmus ILEI subtenadas, sed ne estas konkreta propono.

8.4 Seminario 'Jaro de Familio' RG memorigos al s-ro Tisljar pri la konsento pri ILEI kunlaboro. BZs kontaktos familiojn kun denaskaj infanoj en Hungario kaj aliaj eblaj partoprenantoj (ekz. la lernejo en Budaörs.)

8.6 Internacia Asocio de Instruistoj de Fremdaj Lingvoj. Tio konferencos en Hamburgo en majo 1994. Bormann kaj GEA planas partoprenon. TD starigos rilatojn kun la organizo. Li reprezentos ILEI tie.

8.7 Eŭropa Asocio por Internacia Edukado (EAIE) okazigos konferencon en Hago 2-4 dec 1993. S-ro Edwin Burg aranĝis, ke 63 esp-istoj ricevos nacilingvan informilon. TD/RG esploros kiel ILEI povus reprezentiĝi.

9 Eldonaĵoj (SMG)

9.1 IPR Reagoj pri la enhavo ĝenerale estas favoraj. Sed pro manko de redakciaj fortoj, ekde 92/4 malfruoj aperis. 93/1 ege malfruas; tial apartaj cirkuleroj al la sekcioj. La redaktoro antaŭvidas malpli da profesiaj devoj ekde sept 93; espero ekzistas pri renormaligo de la ritmo. La Estraro principe apogas nacilingvajn resumojn por akceli informadon; laborfortoj nun ne permesas tion.

9.2 Juna amiko La revuo finis la jaron en financa ekvilibro, nur dank' al financa apogo de hungara ministerio. 800 pliaj abonantoj perdiĝis el orienta eŭropo en 1992, nur 1250 abonantoj nun ekzistas. La apogo de Fondaĵo Grabowski kontribuos al 1993, ĉar la hungara ministerio ne resubvencios. Alvenis ĉ. 400 okcidentaj abonoj; necesas 500. (plus ĉ. 400 orientaj). El Britio kaj Brazilo (tradicie fortaj landoj) ne venis abonoj. La unua 32-paĝa numero 93/1 aperis marte kun materialo de ambaŭ redaktoroj.

9.3 Tendaraj tagoj Decidite represi la unuan kajeron en 2000 ekz. SMG aldonos kvar paĝojn por prezenti pli grafike la unukaj du-ligajn verbojn, kaj modifos 4 pliajn paĝojn. 15 paĝoj por la tria kajero estas verkitaj; apero antaŭ Valencio necerta. La unua kajero bone vendiĝis, la dua kovris du trionojn de siaj kostoj ene de 8 monatoj. Sonbendo kaj instruista gvidilo atendo-vicas.

9.4 "Kunvo jaĝu" (Gubbins): La estraro rigardis la presprovaĵojn resendotaj al Edistudio, post rekontrolo de SMG. Apero ĝis Valencio esperata.

9.5 "Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado" (Szanser): raporto de Litovio petita sed ne ricevita. La materialo alvenis sekure en nov 1992, de tiam neniu raporto.

9.6 Symoens: "Propedeutika valoro de E." Aperis ĉe UEA en la serio 'Esperanto-dokumentoj.' Ni diskonigos ĝin en IPR.

9.7 Rakusa: "Metodiko": Stoko de 200 akirita por orienta Eŭropo, ĉ. 30 venditaj.

9.8 Corsetti: Nova eldon-propono kunlabore kun la Universitato de Romo. Libro pri rol-ludoj, kantoj, aktorado de situacioj por infanoj lernantaj fremdan lingvon. ILEI entuziasmas eldoni kaj okupiĝos tuj post ricevo de la tradukita teksto.

9.9 Rømmesmo: Infana Kantaro: ILEI decidas eldoni, post pritakso de RG. EM traktos kun la aŭtoro, aranĝos muziknotojn, ilustraĵojn kaj enpaĝigos.

9.10 Gimnaziaj kajeroj: Unua estas de Arnaudov pri matematiko, manuskripte ricevita. La reeldono de lia verko 'Amuza matematiko' malfortigas la merkaton kaj la bezonon. Manuskriptoj por aliaj temoj bonvenaj (20-30 paĝoj).

9.11 Libroservo: La vendoritmo malrapidegas, ĝin pravigas nur la ebleco interŝanĝe disponigi niajn eldonaĵojn en nepagipovaj landoj.

10 Rilatoj kun aliaj instancoj

10.1 UEA: Pro tempomanko raporto pri ilia estrar-kunsido ne okazis. Pro interveno de ILEI informoj pri la aliĝintaj fakaj asocioj en Jarlibro 1993 ne estos tranĉitaj tiom drastе kiom ĉe nealiĝintaj.


10.2 Aliaj: ELTE universitato en Budapeŝto anoncis, ke ĝi rajtos lanĉi duan internacian kurson (1993-95) en septembro. Vidu la nunan numeron. (Pri IEI vidu 5.3)

10.3 E-Centro Poprad Propono, ke ILEI iĝu part-posedanto ne maturis ĉar ne venis skriba propono.

10.4 Kontrakto kun 'Eventoj': S-ro Szilvasi, la redaktoro de *Eventoj* prezentis kontrakton (v. IPR 93/2). La Estraro konsentis kun ĝiaj ĉefaj tezoj. Post diskuto pri la forteco de la verbo *instigi* en punkto 2.1 la Estararo akceptis la kontrakton kaj konstatis, ke ĝia spirito estas jam efektivigata je reciproka utilo.

Protokolis komputile SMG (26-28 mar 93).

Plena teksto videbla ĉe via sekciestro!



URĜE SERĈATAJ! Kunlaborantoj por IPR.

Unuavice por recenzi priedukajn verkojn, la plej gravajn detale, aliajn per 10-20-linia priskribo. Duavice, por liveri kompletе presepretajn fakajn artikolojn, raportojn aŭ informojn. Triavice, se proksima al Budapeŝto, por trakribri la gazetojn de sekcioj kaj aliaj por eltiri kaj koncize mencii erojn de internacia intereso aŭ utilo. Anoncu vin al la redakcio.

SERĈATAJ KOMISIITOJ:

Plej urĝe nova ekzamena sekretario, vidu p. 18. Plie kunlaborantoj por IPR (vidu p. 35), kaj plie la sekvaj oficoj .:

Kontaktilo kaj statistikado: Komputil-posedanto prefere IBM-PC-kongrua, kiu pretus enketi pri instruado ĉiunivela kaj bezonojn por kontaktado, enigi la rezultojn en datum-bazon kaj pretigi la rezultojn por publikigado.

Terminologio: Kompetentulo kiu pretus kunlabori kun TEC kaj la Akademio pri pretigo de pedagogia terminaro.

Informado kaj gazetara servo: Tiu tasko estis detale skizita en IPR 92/3 p. 37)

Korespond -instruistoj: Ni serĉas instruistojnj pretaj korespondi unuope kun novaj afrikaj instruistoj, donante lingvajn kaj pedagogiajn konsilojn.

Labortablete

Novaj verkoj: *Originala Esperanta Bildvortaro* originale verkita de Sylla Chaves, Brazilo. Trimil bildigitaj vortoj en 96 bele desegnitaj nigra-blankaj bild-paĝoj, kun alfabeta kaj laŭtema indekso. ● *Ni parolas Esperante*, Vladimir Nemec, lernotekstoj por progresintoj, 37 lecionoj, nur Esperante krom la vortlisto, kiu donas slovakajn ekvivalentojn. Statikaj temoj, tajpita kun desegnaĵoj. ● *Baza Cseh-kurso kun metodikaj konsiloj* de Andreo Cseh, oka reviziita eldono, de IEI, Hago. 15 NLG por ekzempleroj kie necesas glui tri bildojn; 24 NLG cetere. ● *Klerigkibernetiko, kolektitaj publikigaĵoj de d-ro Helmar Frank.* 1136-paĝa, el la 106 artikoloj, 23 estas en Esperanto. 77 NLG ĉe UEA. ● *Esperanto Schritt für schritt (partoj I, II kaj III).* Laŭpaŝa korespondа kurso por german-lingvanoj, precipe junuloj. Thomas Pusch, Rheinweg 15, D-W-5300 Bonn 1, Germanio. po 4 DEM inkl. sendokostoj. ● *Vortaro Franca-Esperanta* de Ĵak LePuil kaj Jopetro Danvy aŭtoris/kunordigis. 944 paĝoj, 32.000 vortoj kaj 100.000 esprimoj. Eldonis UFE; 250 FRF.

El sekciaj bultenoj: La printempa numero de *Esperanto Teacher* montras, ke nia brita sekcio modele diskonigas nian internacian laboron, sur unua paĝo la kurso Charters detale konigita, meze la konferenca/gimnazia mendilo plene represita; plie represo de la novjara mesaĝo kaj anonco pri *Juna amiko* kaj IPR. (Tiujn represis ne nur pluraj sekcioj bultenoj, sed kelkaj ĝeneralaj gazetoj, i.a. *Esperanto USA* kaj *Franca Esperantisto*). ● Numero 34 de *NGGE-sciigas* sciigas, ke la nederlanda sekcio denove pretas subvencii la partoprenon de du nederlandaj junuloj en la Gimnazio. Espereble ĉi-jare tro viĝos iremulo! ● La *AAIE-bulteno* de jan 93 informas, ke Esperantic Studies Foundation (ESF) subtenis disertacion de Dr-oj. Alvino E. Fantini kaj Timothy G. Reagen sub titolo 'Esperanto kaj edukado: cele al esplorprioritatoj.' Ĝi estas 136-paĝa kun ses ĉeftemoj: Dulingvismo; E-instruado; Lingvo-pedagogio; instrumaterialoj; enkonduko de E-programoj en usonaj lernejoj; rekomendoj. Akirebla kontraŭ $12 de ESF, J. Pool, Dept. Political Science, DO-30, Seattle, WA 98195, Usono.

Pagita anonceto: Kion ni faru por ke nia lingvo baldaŭ estu instruata en ĉiuj lernejoj tutmonde? Informas: S-ro André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, F-68390 Baldersheim. Bv. sendi koverton kun via adreso kaj 2 francajn pm. je 2,50 FRF aŭ 2 irpk. (Ĝi reklamas sensupersignigon. -red.) ● Ebenaĵ-vilaĝan ripozadon proponas per esperant-lingva prospekto: Pehely Kft., Horváth Döme 14, H-6000 Kecskemet, Hungario.

Infan-desegnaĵoj: E-klubo 'Bona stelo' en Romans okazigos ekspozicion de infandesegnaĵoj ekde la 20a de septembro 1993. Lernantoj de 8- ĝis 12-jaraj. Temo: 'La arbaroj de la mondo'. Dimensioj: 24 x 32 cm. Dekon da plej bonaj desegnaĵoj bv. sendi ĝis 1a junio 1993 en nefaldebla koverto al: s-ino Gisèle Besson, Le Dauphin 'B', Avenue Emile Zola, F-26100 Romans, Francio. Dorse de desegnaĵoj skribu la plenan nomon, aĝon kaj adreson de la verkinto. Aŭdkasedoj kaj prinaturaj libroj kompensos la plej belajn desegnaĵojn.

Ellasoj: Leteroj de s-roj Ringli (Svisl.) kaj Merger (Francio) pri verboj en Esperanto povos aperi nur en IPR 93/2 kune kun responda artikolo pri valentoj, transitiveco kaj -ig-/-iĝ.

Pro nia financa situacio ni ekde nun rigore limigas IPR al 36 paĝoj. Sekve la tre telegram-stila fino al la numero, notante multajn erojn, kiuj meritus pli da atento, kaj prokrastigo de kelkaj artikoloj.

Redaktofino: 19 apr. 93.

SEKCIESTROJ DE LA LIGO

Argentino: Herminia Kirkerup de Fernandez (s-ino), Calle Cerrito 1249, Barrio San Martín, RA-5000 Córdoba, (Córdoba)
Aŭstrio: Mag. Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien
Belgio: Alex Humet, Van Campenhoutstr. 4, B-2600 Berchem
Brazilo: Elvira Fontes, Rua Machado de Assis 243, ap. 11, BR-04106 Sao Paulo SP
Britio: Arnold Pitt, Yew Tree Cottage, Ivington Road, Leominster, Herefordshire HR6 8QD
Bulgario: Ivanka Spasova, j.k. Lenin bl. 20, vh. 3, BG-1124 Sofia
Ĉehio: Miroslav Malovec, Charkovska 7/10, 625 00 Brno
Ĉinio: Zhang Danchen, General Foreign Languages Dept., 29-34 North Part, Huazhong Normal University, CN-430070 Wuhan
Estonio: Eve Otsa, Juhkentali 30-12, EE-0001 Tallinn
Finnlando: Synnöve Mynttinen, Keskussairaalankatu 5 M 133, SF-15850 Lahti
Francio: S-ino F. Drouard, Chalet Denali, Chemin du Thural, F-74920 Combloux.
Germanio: Stefanie Tucker, Alatseestr. 14, DE-W-8900 Augsburg *(eble ŝanĝota)*
Hispanio: Manuel López Hernández, Poŝtkesto 832, E-41080 Sevilla
Hungario: Kovács Márta, Ady E. u. 23-25/C, HU-1221 Budapest
Israelo: Murjan Josef, P.K. 1289, IL-61012 Tel-Aviv
Italio: Catina Dazzini, C.P. 22, IT-54100 Massa
Japanio: *vakas kaj forstrekota.*
Korea Resp.: So Jin Su, Dept. de Ekonomiko, Universitato Kangnam, Kugali Kihung-up, Yongin-gun, Kyonggi-do 499-900
Kroatio: Zdenka Svetličić, Kroatia Esperantista Unio, Trg Burze 2, HR-41000 Zagreb
Nederlando: D. Luesken-Burger, Renderklippenweg 5, NL-8162 NC Epe
Nordameriko: Doroteo Holland-Kaupp, 5140 San Lorenzo Dr., Santa Barbara, CA 93111-2521, Usono
Norvegio: *Turnu vin al* NEL, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5
Pollando: p/a Silezia Esperanto-Asocio, ul. Dubois 3, PL-50-952 Wroclaw 17
Portugalio: D-ro Antonio M.C. Coimbra, Rua Colonel M. Leitao 20.1 Esq., P-1700 Lisbon
Rumanio: Angela Stoica, Platanilor 17 C ap. 4, RO-1900 Timisoara
Sanmarino: Marina Michelotti, Contrada del Collegio 51, RSM-43031 San Marino
Slovakio: Anton Zachariás, Sobotské námestie 6, 058 01 Poprad
Slovenio: Sonja Tavcar, Liminijanska 6, SLO-66320 Porotoroz
Sud-Afriko: *vakas*
Svedio: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby
Svislando: Nicole Margot, Tour Grise 28, CH-1007 Lausanne
Venezuelo: Prof. Juan Eduardo Bachrich, Apartado 70782, Caracas 1071 A.
Zairio: Ngangu Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Bas-Zaire)

REPREZENTANTOJ DE ILEI

Albanio: Bardhyl Mezini, Rr. Maliq Muco, Pall. 50, ap. 3, Tirana
Armenio: Lida Elbakjan, Moldovakan 26/2, kv. 52, Erevan.
Aŭstralio: Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney, SA 5069.
Bangladeŝo: Sultan Ahamad, Factory Inspection Dept., 4 D.I.T. Avenue, Dhaka-1000.
Centrafrika Respubliko: Luc Feidangai, B.P. 70, Bangui.
Ĉilio: Luis A. Vera, Isabel Riquelme 7115, Pobl. C. Estrella, La Cisterna, Santiago.
Hindio: Abani Halter, Jamboni, P. O. Bolpur 731204, W. Bengal.
Irano: Mohammad Karamudini, P. O. Box 13445-747, Teheran. Iran.
Islando: Loftur Melberg, Skolabraut 1, IS-220 Hafnarfjördur.
Jugoslavio: Radojica Petrovic, Bul. Oslobodjenja 36, YU-32000 Cacak.
Kostariko: Jorge A. Leoni de León, Apartado 7603-1000, San José.
Kubo: Hector Jiménez, Vista Alegre 264 e/J.B. Zayas y Luz, Caballero, Vibroa, 11500 C. Habana.
Litovio: Algimantas Piliponis, Karolinisiu 3-93, LT-2044 Vilnius.
Niĝerio Godwin Oboh, University of Ekpoma Wan, Illeh Box 62, Epoma Bendel.
Nov-Zelando: 12C Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1.
Tanzanio: Mramba Simba, S. L. P. 1051, Bunda Mara.
Togolando: Afantchao-Biakou Yao, B.P. 20225 Lome.
Ukrainio: Svetlana Fedotova, P.O. Kesto 88, UKR-253222 Kiev.

LABORKOMISIONOJ

Didaktikaj ludoj: Georges Sossois, rue du Basson 79, B-6001 Marcinelle; tel. (+32 71) 43 62 05.
Ekzamenoj: *vakas*. Provizore Budapeŝto plenumas.
Eŭropa Komunumo kaj informado en pedagogiaj medioj: Edward Symoens, Putsesteenweg 151, B-2920 Kalmthout (Heide); tel. (+32 3) 666 62 66.
Gazetara servo kaj informado: *vakas sed pretas kunlabori:* Germain Pirlot, Steenbakkerstr. 21, B-8400 Oostende; tel. (+32 59) 70 87 00 kaj Walter Klag, Rudolfinergasse 8/11, A-1190 Wien; tel. (+43 222) 36 86 29.
Konkursoj lernejaj: Géza Kurucz, Nyiri u. 11, H-6000 Kécskemet.
Lerneja kontaktigo kaj statistikado: *vakas*. Provizore Budapeŝto plenumas.
Statuto: Rob Moerbeek kaj Oene Hoekstra, Frederikslaan 47, NL-1871 SB Schoorl; tel. (+31 2209) 15 65.
Terminologio: *vakas*
UN-Jaro de la Familio 94: Glossop-MacGill

KUNLABORANTAJ INSTITUCIOJ

UNESKO: (rilatoj de reciproka informado, kat. C): Place Fontenoy, F-75007 Paris. Reprezentanto de ILEI: François Lo Jacomo, 21 rue Juliette Dodu, F-75010 Paris
UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.
IEI: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.
KCE: Kultura Centro Esperantista, BP 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds.
ECP: Esperanto-Centro Poprad, Sobotske nám. 6, 058 01 Poprad, Slovakio.

KONTRIBUAĴOJ AL IPR

Kontribuaĵoj al IPR estu nete tajpitaj per nigra rubando sur blanka papero kun adekvataj marĝenoj, taŭga por OKR-enlego, aŭ surpapere prespretaj. Livero sur IBM PC-kongruaj disketoj (5,25 aŭ 3,5 colaj) bonvenas. Adreso de la redakcio sur la kovrilpaĝo. Bv. skribi vian nomon kaj adreson sur la manuskripto. Fakaj artikoloj prefere ampleksu 3 ĝis 8 presitaj paĝoj. Pedagogiaj novaĵoj, informoj pri edukaj aranĝoj, interŝanĝaj gazetoj kaj leteroj al la redakcio bonvenaj. Ni recenzas nur ricevitajn eldonaĵojn iel rilatantaj al edukado aŭ utilaj en instruado.

MEMBRIĜO AL ILEI KAJ PAGOJ POR ALIAJ SERVOJ

La membreco inkluzivas ricevon de kvar numeroj de IPR jare. Turnu vin al via landa sekcio, kiu fiksis kotizon en via propra valuto. Por pagi rekte al la internacia ILEI, skribu al la kasisto:
Kasisto de ILEI: B. Andreasson, Södra Rörum pl. 455, SE-242 94 Hörby, Svedio; poŝtĝirkonto 682117-7 (Stokholmo). Membreco kostas 50 svedajn kronojn en landoj sen sekcioj kaj 80 SEK en landoj kun sekcioj (la sekcio ricevos la diferencon). Pro altaj banko-kostoj, evitu bankĉekojn kaj internaciajn poŝtoĝirojn; taŭge plenumita Euroĉeko plej bonas. Alia pagmaniero estas al UEA:
UEA, Nwe. Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, pĉk 37 89 64. Klare indiku la celon de la pago kaj la internan konton de ILEI: **ilek-a**. Se rilatas al *Juna amiko*, uzu konton **juna-l**. Prefere informu senpere la kasiston de ILEI pri via enpago. Membreco: 16 GLD en landoj sen sekcioj, 24 GLD en landoj kun sekcioj.
Hungara ILEI-sekcio: (adreso: tria kovrilpaĝo) akceptas pagojn en hungaraj forintoj de reform-eŭropanoj por membreco kaj aliaj servoj de la Ligo.